

# LITERATURA MONDO



OKTOBRO 1925, KVARA JARO, DEKANO

## REDAKTA KOMITATO:

JULIO BAGHY, PAULO BALKÁNYI, KARLO BODÓ, KOLOMANO DE KALOCSAY,  
PAULO DE LENGYEL, DR<sup>o</sup> VINCEN TO TÓTH, PAULO VARSÁNYI  
RESPONDA REDAKTORO: DR<sup>o</sup> BÉLA RÁCZ DE KÖVESD L. K.

ELDONAS: HUNGARA ESPERANTO INSTITUTO BUDAPEST, EÖTVÖS-UTCA 3

## NIA KUNLABORANTARO

LOUISE BRIGGS (ARMLEY), J. GRAU CASAS (BARCELONA), HELMI & HILDA DRESEN (TALLINN), NIKOLAO HOHLOV (VARSOVIO), IVAN H. KRESTANOFF (PIRDOP), A. MAZZOLINI (FERMO), JAN VAN SCHOOR (ANTWERPEN), TIBERIO MORARIU (BUCURESTI), PAUL NYLEN (STOCKHOLM), EMMA L. OSMOND (LONDON), PETRO STOJAN (CHISINAU), M. SOLOVJEV (NOVI SAD), DR<sup>o</sup> LEONO ZAMENHOF (VARSOVIO), RAYMOND SCHWARTZ (PARIS), J. JURYSTA (CZENSTOCHOVA), STANISLAW BRAUN (LÓDZ), HENRIKO SEPIK (TALLINN), DANIEL EYQUEM (PARIS), ZANONI STAN KAMARYT (BRATISLAVA), RUD. HROMADA (PRAHA)

JARABONO: 144.000 HUNG. KRONOJ.

## KARA LEGANTO

Pro ne tro akurata ŝuldkvitigo de niaj ŝuldantoj L. M. travivis finanĉan krizon kaj ne povis aperi laŭkutime je la preciza dato. Ni petas pardonon de niaj est. abonantoj kaj konsciencaj reprezentantoj, kiuj suferis pro la prokrastemo de aliaj. Petas indulgon kaj bonvolan subtenon la

ADMINISTRACIO

## BIBLIOGRAFIO

### FERDINAND HIRT & SOHN KAJ LA INTERNACIA MONDLITERATURO

Eldoni serion da verkoj en nunaj cirkonstancoj apartenas preskaŭ al heroaĵoj, signifas obstinan spitadon kontraŭ la indiferento kaj nelegemo de E-istaro, kies neglekto jam danĝerigas la evoluon de nia literaturo. Fidon kaj idealismon devas havi tiu firmo, kiu neŝparante monon kaj laboron riskas eĉ pli por vekti la interesigon de nia popolo, kiu fervore babiladas, korespondas, propagandas, sed ne vidas aŭ ne volas lasi sin konvinki, ke fortikaĵo, certiganta la vivon de la lingvo kaj movado, estas defendebla per bastionoj de forta, riĉa, estimpostulanta literaturo. Infananima giganto estas nia popolo, kiu timas la ekkonon de aboco, ĉar tio postulus iom da laboro kaj tial preferas aŭskulti fabeladon pri siaj prapatroj, herooj anstataŭ legi iliajn verkojn kaj taksu ilin laŭvalore. Jen la ĉefa kaŭzo, ke la plimulto parolas „kuirejan“ lingvon anstataŭ la „literatura“ kaj eĉ multjaraj esperantistoj plendas senkulpigante sin „mi ne povas bone paroli, ĉar mankas esprimoj kaj ekzercado.“

La firmo *Ferdinand Hirt & Sohn* estas el tiuj malmultaj entreprenoj, kiuj havas kuraĝan persiston, fidon kaj honestan idealismon por vekadi la dormantan konscion de nia infananima giganto, kaj donas okazon al ĉiu E-isto kulturi sin literature. Laŭdinda kaj subtenenda klopodo. Spirito de lingvo kuŝas en sia literaturo kaj sole la finevoluo de nia literatura lingvo povos kateni al si la seriozan atenton de tiuj medioj, kiuj ĝis nun skeptike retenas sin de nia movado.

*Ferdinand Hirt & Sohn* sinsekve aperigas bonegajn verkojn en sia *Internacia Mondliteraturo*. Serio da diversnaciaj valorajoj en bonaj tradukoj kaj en bongusta formato. La eleganta eksterajo ĉiam logas al la beleco de la interna enhavo. Sajnas al mi, ke la respektinda firmo faras strangan militiron kontraŭ la indiferento kaj nelegemo kaj vicigas la plej bonajn verkistojn por venki. Brava batalo, kiun mi aprobas, ĉar la venko donas triumfantan vivon al la venkito. Aĉetu la eldonaĵojn de la firmo, ĉar ili estas valoraj; legu ilin, ĉar la verkoj donas netakseblan profiton al via lingvoscio, kaj disvastigu ilin, ke freŝan municion ni havu por venki la skeptikulojn kaj vekti la dormantan konscion de niaj indiferentuloj.

La sola riproĉeto, kiun mi havas kontraŭ la firmo, estas la nesufiĉa atento pri graveco de la originala literaturo. Esperable tiu-ĉi manko baldaŭ malaperos, se la firmo vidos sian oferecon ne tute vana.

Ĉi sube mi klopodos koncize recenzi kvin volumojn de *I. Mondliteraturo*.

### TAKEO ARISMA: DEKLARACIO

Romano El la japana originalo tradukis *T. Toogun*, 125 paĝoj.

Romano, en kiu la realeco tragedie subpremas la romantikon. La filozofiaj partoj permesas enrigardon en la animon de japano. Malespera lukto de du mondperceptoj, orienta kaj okcidenta, en kiu lerte plektiĝas la ĉefa temo: la amo de du junuloj al sama knabino. La verkisto majstre nuancigas, kaj kelkloke kvazaŭ fortiras la vualon de sia nobla animo por vekti sinceran admiron por si. Kelkaj strangajoj de traduko tamen estas: *Larmoj, kiaj estas sekreciataj ĉe la rememorado; kiu dirinte: Donu al mi! bruligis sian solan okulon; mi ne povas krompensi k. a. Precipe la uzado de krom estas nekonsilinda, tamen tio ne malhelpas la ĝuadon de la verko.*

### EDGAR ALLEN POE: SES NOVELOJ.

El la angla orig. traduk. *A. Frank Milward*, 80 paĝoj.

La verkoj de Poe estas mondfame konataj, kaj aperis preskaŭ en ĉiu kulturlingvo, tamen agrable surprizis nin la elektado de tiuj ĉi ses noveloj kaj plie la esprimriĉa kaj bonstila traduko. La strangaj, timigaj rakontoj, kiel grimacoj de baraktanta animo, ne sole vekas la intereson de la leganto, sed samtempe tremigas lian koron. Vole-nevole ni sekvas sinforĝese la aŭtoron tra la mallumajoj de la vivo kaj spirita deformiĝo. Neforpeblaj pensoj vekigas dum la legado, kiujn kvankam konfuzas, sed ne forigas la du satiraj komikaĵoj. La genio de Poe alspiras pian atenton kaj konservas la interesigon de la leganto, kiu ne bedaŭras la elspezon por tiu literatura valorajo.

### HONORÉ DE BALZAC: LA FIRMAO DE LA KATO, KIU PILK-LUDAS

El la franca orig. trad. *Paul Benoit*, 64 paĝoj.

Balzac. Kiu ne konus la nomon de tiu-ĉi mondliteratura giganto? Li levigis per siaj verkoj al supro de la Parnaso. Tiu ĉi verketo apenaŭ donas percepton pri lia genio, tamen lia psikologia talento abunde disŝutas siajn perlojn ankaŭ ĉi tie. La traduko de Prof. Benoit sukcese luktis kun la peza kaj esprimriĉa stilo de la aŭtoro kaj en sia traduko donis ion tute novan al la leganto: laŭvortan ĝustecon kun *facila* komprenebleco.

### VLAS DOROSEVIC: ORIENTAJ FABELOJ

El la rusa orig. trad. *Nikolao Hohlov*, 64 paĝoj.

Mem la vivo ridetas al ni el tiuj ĉi fabeloj. Ĉarme, iom ironie kaj moke, sed tiel trafe, ke ni ne povas liberiĝi de ilia (*Dairigo sur la antaŭlasta paĝo*)

# M I A K R I M O

I V A N F R A N K O



Ne, mi ne eltenos! Mi ne povas pli longe persisti! Nepras publike konfesi la krimon, kvankam mi antaŭsentas, ke mia animo pro tio ne malpeziĝos. Ĉar ĉiokaze rekompenco neebla, ĉar kia kontentigo povus rekompensi senkulpe versitan sangon, anstataŭi ĉesigitan vivon!

Teruras min, kiam tiu malfeliĉa okazaĵo klare, kun ĉiuj detaloj, aperas en mia memoro. Multaj jaroj jam de tiu tempo, certe pli ol tridek. Mi estis tiam malgranda vilaĝa knabo kaj kuradis, ludante, tra arbaroj kaj kampoj de mia hejma vilaĝo.

Guste alvenis la printempo, la unuaj belaj varmaj tagoj. Post la longa vintra mallibero en malvastaj kabanoj, ni, vilaĝaj knaboj, la unuan fojon povis libere jom kuri. Ni elkuris sur la herbejon, kiu estis ankoraŭ nuda kaj griza pro la antaŭ ne longa malapero de la vintra kovrilo. Nur tie kaj tie trapikis la teron freŝa verdaĵo. Nur en la apuda arbaro la tero blankiĝis pro floranta simforikarpo, blue makulita per safrano.

Super ni tremis la blua ĉielo, ridetis la suno, kaj la malproksimaj pintoj de la Karpatoj brilis per potencaj neĝoĉapoj similaj al la lumaj diamantaj kronoj. Sed ilia beleco ne tro kortsuŝis nin, ĉar ĉiunmomente mi sentis la malvarman vintran blovon kiu fluis de ili malsupren oriente. Ankaŭ ia rivereto sentis tion. Matene ĝi fluis pure kaj klare kaj murmuretis mallaŭte kiel en somero, sed nun ĝi kolere klakadis inter ĝiaj mallarĝaj bordoj kaj premis malsupren siajn malpure flavajn kolerajn ondojn: tio estis ĝuste la brilaj diamantoj fanditaj de l' printempa suno.

Sed ĉio ĉi ne sukcesis malhelpi nian printempan ĝojon. Ni vagis, saltis kaj kuris ĉirkaŭe, kaj vizitis ĉiujn konojn: la maljunan potencon kverkon ĉe la arbaro, sur kies gigantaj branĉoj somere ni vetrampis kun sciuroj; la altan klinitan betulon kun funebre pendantaj branĉetoj, kiujn ni, je granda malkontento de la arbaristo, uzis kiel balancilon; la silentan fonton en arbara densaĵo, kie ni, ofte embuskis vespere inter arbetoj, observante la vulpojn, melojn kaj aprojn, kiuj venadis trinki akvon; kaj fine la profundajn, klarajn riverojn, kien ĉiudimanche kun fiŝhokoj logis la ezokojn, kaj kiam la suno tro fajris, kun krioj kaj ridego freŝiĝis en la pura kaj malvarma akvo.

Nune, verdire, ĉirkaŭe estis sufiĉe nude kaj malgaje, kaj en la akvo, kiu somere ĉiuloke moviĝis pro ezokoj kaj aro da ruĝokulaj plotoj naĝantaj gvidate de unu plej granda, nuntempe estis silenta. Sed ni, ĉiupaŝe, scivole observis la akvon, ĉiun bastonon, ĉiun velkitan foliaron, ĉiun karikaron ĉu eble sufokiĝis sub glacio iu ezoko, aŭ eble moŝta lutro vizitis la fiŝan anaron.

— Ps! Pss! — eksiblis subite du aŭ tri knaboj, kiuj iris antaŭ mi, kliniĝis al la tero kaj ekrapis mallaŭte antaŭen, penante ĉirkaŭfermi arbuston.

— Kaj kio estas tie? Kio estas tie? — ekdemandis mi ankaŭ mallaŭte.

— Birdo! Birdo! ĉu vi ĝin ne vidas?

— Kie ĝi estas? Kie?

— Jen ĉi tie en la arbusto. Kaptu. Tiaspecan ni ankoraŭ ne vidis. Verŝajne ĝi ne flugas, sed nur kuras.

Ĝis kiam la knaboj ĉirkaŭiris la arbuston, mi iris rekte en la arbuston, singarde disklinis la densajn branĉojn kaj vere, ekvidis malgrandan birdon, kiu kaŝiĝis en la pasintjara kariko. Mi ne scias ĉu ĝi estis malfortigita, aŭ timigita, sed, ekvidinte min super si, ĝi nek forflugis, nek kuris kaj mi havis ĝin sammomente en la mano. Ĉiuj knaboj alkuris por vidi mian kaptiton.

— Ho, kiel bela!

— Tiam birdeton mi ankoraŭ neniam vidis.

— Vidu nur ĝiajn okulojn!

— Kaj ĝia plumaro.

Ĝi estis malgranda marĉbirdeto, kiu en nia submontara regiono aperas tre malofte. Ĝia plumaro estis cindre griza

kun delikata perla brilo, la beko maldiketa, malhele-verdeta, kaj similaj longaj, delikataj piedoj. Ĝi sidis silente, kaŝita en mia pugno, me batis per flugiloj, me gratis kaj ne bekpikis, kiel tion faras ordinare alispecaj sovaĝaj birdoj, kiam oni ilin kaptas en la manon.

— Kion vi faros kun ĝi? — demandis min kelkaj knaboj, rigardante per avidaj okuloj la belan kaptiton en mia mano.

— Mi portos ĝin hejmen.

— Ĉu vi rostos ĝin?

— Ĉu mi scias? Mi ĝin nutros.

— Kaj ĉu vi scias, kion ĝi manĝas?

— Mi vidas. Se ĝi ne manĝos panon, eble ĝi manĝos muŝojn, kaj se me, do vermojn se ne vermojn, do limakojn aŭ kanaban semon aŭ milion. Mi jam trovos ion por ĝi.

Mi vere portis la malgrandan, belan birdeton hejmen kaj metis ĝin ne en kaĝon, nur inter la duobla fenestro, kie ĝi povis pli oportune kuri kaj flugi, havis pli da lumo kaj aero. La birdo ne flugis, uel baraktis, nur kuradis laŭlonge de la fenestro, tie ĉi kaj tie frapetante per sia maldika beko kontraŭ la vitro, kaj ĉiam, kiel al mi ŝajnis, reve rigardis en la vastan, liberan mondon. Jam haltis, klinis la kapeton aŭ turnis ĝin flanken, per unu okulo, ŝajne, rigardante la branĉojn de apuda pomarbo, kaj poste kapjesadis tiel malĝoje, kvazaŭ ĝi volus diri:

— Ho, tie ekstere estas tiel bele kaj varme, sed mia printempo perdita! Mi estas en mallibero!

Min kvazaŭ io pikis en la koron, kiam mi dum kelka tempo observis tiun birdeton. Mi mem malĝojigis.

— Liberigu ĝin! Por kio vi tenos ĝin ĉi tie! — flustris io interne de mi.

— Sed ĝi estas tiel bela! Mi ja ĝin kaptis! — respondis mi persiste al mi mem. — Eble ĝi alkutimiĝos. Ke mi nur sciu, per kio mi ĝin nutru.

Pro nutrado mi vere havis sufiĉe da klopodoj. Mi metis al la birdo kelkajn panerojn, dekelkelajn semojn miliajn kaj provizon da dommuŝoj, ĉiun specon de nutraĵo en aparta pura konko, aparte freŝan akvon kaj foriris, por lasi ĝin trankvila. Kiam vespere mi revenis hejmen kaj enrigardis al mia birdeto, ĝi eĉ ne tuŝis la manĝaĵon, nur sidis en angulo, alte supren streĉis la maldikan koleton kaj, eĉ ne okulmovinte, rigardis eksteren tra la fenestro, kie purpurflamante subiradis la suno post la neĝan ĉapon de montosupro, kaj de tempo al tempo ĝi kapjesadis tiel malgaje kaj senespere, ke mi ne povis ĝin pli longe rigardi.

Eble ĝi estas nokta birdo — pensis mi, — kaj ĝi manĝos dum nokto. Tiu penso iom min trankviligis, kaj mi forte dormis kaj ne pensis pri la birdo. Tuj matene, preskaŭ tagiĝe, mi denove kuris en la ĉambron enrigardi la fenestron. La birdo sidis ĉiam en la sama loko, kie mi ĝin vidis hieraŭ, ĉiam streĉante supren la koleton kaj ĉiam, ne okulmovante, ĝi rigardis tra la fenestro en la vastan liberan mondon tie post la vitraj kvadratoj, kapjesante foje kaj foje. La nutraĵon ĝi eĉ ne tuŝis.

— Ellasu ĝin! Liberigu ĝin! ekkriis io al mi interne. Kial mi ĝin turmentu? Ĝi mortos ja pro malsato.

— Ne, — respondis la alia, obstina voĉo en mi, — mi nepre trovu, kion ĝi manĝas! Mi havigos al ĝi limakojn, vermojn kaj ranovojn.

Mi ne komprenas, kial mi ekpensis ke ĝi manĝos ranovojn. Mi tuj kuris la paŝtejon, kolektis provizon da malgrandaj limakoj, fosis vermojn kaj el la marĉeto plenmanon da ranovojoj. Ĉion ĉi mi alportis al mia kaptito. Ĝi eĉ ne atentis min, kiam mi tiun bonajon antaŭmetis, montris nek timon, nek eĉ etan intereson, nek eĉ etan apetiteton kontraŭ tiuj frandaĵoj. Ŝajnis, ke nur la suno, varmo kaj printempo tie en la vasta libera mondo okupis ĝian intereson.

Tiutage mi havis ian okupon, tial mi foririnte, revenis nur vespere. Mi rapidis vidi la birdeton. Ĝi kuradis mal-

peze, kapjesante, laŭlonge de la fenestro, kaj eĉ ne tuŝis la manĝaĵon.

— Stranga mirindaĵo! — mi ekpensis kaj volis tuj ĝin elasi libera. Sed mi ekpensis, ke nun ĝi estas certe laca kaj ne flugpova, kaj se mi tuj vespere ĝin ellasos ie en la korto, ĝi facile fariĝos apetitiva akiro por mia kato. Prefere ĝi tranoktu hodiaŭ ankoraŭ eĉ mi. Kaj morgaŭ frumatene mi reportos ĝin en la lokon kie mi ĝin kaptis kaj ellasos ĝin.

La postan tagon, ellitiĝinte matene, mi saltis al mia kaptito. Ĝi denove prenis nenian manĝaĵon kaj sidis malfortigite kaj lace en la anguleto, ĉiam rigardante tra la fenestro en la liberon. Ĝi lasis sin trankvile manpreni kaj ekrigardis min per la samaj nedireblaj malgajaj okuletoj, per kiaj ĝi rigardis tra la vitroj al la suno kaj al la branĉoj de la pomarbo. Foje ĝi eĉ kapjesis, kvazaŭ dirante:

— Jes, jes, mi jam scias, kien oni min portas. Mi delonge jam sciis ke tio okazos.

Mi portis ĝin en la korton. Ĝi sidis trankvile en mia mano. Mi sentis ĝian molan plumaron kaj ĝian varman korpon.

— Bongusta devas esti ĝia viando! — traflugis la penso mian kapon. — Kial mi ĝin ne buĉu kaj rostu?

— Lasu ĝin! Lasu ĝin! — flustras interne mia bona anĝelo. — Vi ja vidas, ĝi estas tiel malgranda. Eĉ la penon ne valoras — ĝin rosti.

— Sed domaĝas ĝin ellasi! Mi ja ĝin kaptis! — ribelis mia infana obstineco.

— Lasu ĝin! Lasu ĝin! — petkarezis io mallaŭte en la plej profunda ejo de mia animo. Kaj la birdeto sidis trankvile kaj rezigne en mia mano. Mi malfermis la pugnon — ĝi ne forflugis. Io abomena, malica ektriumfis en mia interno.

— Vidu! ĝi mem ne volas! Vi ja ebligis al ĝi la forkuron, kial ĝi ne forkuris!

— Sed ĝi estas malforta kaj malsatigita, — flustris io mallaŭte en mia animo.

— He, kion! — ekkriis la infana obstino kaj en la tuja momento mi fortordis la kapeton de la eta, bela birdeto. Ĝi ekkuis unu aŭ dufoje per siaj delikataj piedetoj, el la koleto ekgutis du-tri sangogutoj, kaj la malgranda, bela birdeto ne vivis plu. En mia manplato kuŝis malvarma senanima kadavro.

Kaj per unu fojo rompiĝis, disiĝis mia tuta obstino, furiozo, egoismo. Mi klare ekkomprenis, ke mi jen faris ion sensencan, abomenan, ke mi plenumis senkoran mortigon, ŝarĝis min la krimo, kiun mi neniam elpentos kaj repreĝos. Mi ja neniigis tute sencele tian belan, senkulpan vivon! Jen ĉi tie, en la libera dia mondo, antaŭ la okuloj de tiu bela, varma, printempa suno, mi verdiktis kaj plenumis neniel motivitan mortigon. Nun mi sentis tute klare

kaj precize, ke la mortigo estis plene sencela. Ĉar tiun malfeliĉon mi povos nek prepari nek manĝi. Ne, mankis al mi la forto eĉ ankoraŭ foje ĝin vidi. Mi lasis el la mano la malvivan birdeton kaj hontigite, malgaje, premegite kaj konsternite, mi forkuris, for de ĝi, por ĝin ne vidi, por forviŝi el la animo eĉ la rememoron pri ĝi. Mi tre volis plori, sed mi ne povis; io kvazaŭ per prenilo kunpremadis mian animon kaj tiu ne povis elverŝi en larmoj sian doloron. Malgranda, bela birdeto kuŝis en mia animo, kaj mi portis ĝin kun mi, kaj ĉiam ŝajnis al mi, ke ĝi rigardas min per siaj malgajaj okuletoj, rigardas kun mallaŭta rezigno, kapjesas kaj diras:

— Ho, mi sciis, ke pereis mia printempo, ke la mallibero estos samtempe ankaŭ mia morto!

En la mola, sentema infana koro ne longe daŭris tiuj ĉagrenoj. Post du-tri tagoj mi jam forgesis la birdeton kaj ĝian kruelan sorton. Mi forgesis, ŝajne, por ĉiam. La impresoj de mia krimo kaŝiĝis ie en malluma anguleto de mia animo kaj iom post iom kovris, dormiĝis, kaj surŝutis ĝin aliaj impresoj, aliaj rememoroj.

Tamen ĝi ne formortis, (Pasis plenaj dudek jaroj, kaj kiam falis sur min la unua malfeliĉa sortobato, kiam mi juna, kun koro plena de flama viv- kaj amdeziro, meze de belega somero velkis kaj malgrasis en malliberejo kaj perceptis la disreviĝon de ĉiuj miaj esperoj, kiam senkompatate oni ĉifis, piedpremis, ruinigis kaj detruis ĉion, kion mi opiniis la plej kara trezoro de mia animo, tiam, dum terura, sendorma nokto aperis antaŭ mi tiu malgranda bela birdeto, pikis mian koron ĝiaj malgajaj, plenrezignaj okuletoj: konfesis al mi ĝiaj malrapidaj movoj tiun satane teruran frazon:

— Ho, mia printempo pereis! Mi en la mallibero! Mi jam scias, scias kiel tio finiĝos.

Kaj de tiam mi ne plu povas liberiĝi de tiu rememoro. Ĝi venas al mi ĉiun ĝojan momenton, rompas mian forton kaj kuraĝon en la malfeliĉoj. Ĝi turmentas mian konsciencon per riproĉoj, kaj ŝajnas al mi, ke ĉio malsaga, sencela, malica kaj malbela, kion mi nur faris en mia vivo, kristaliĝis konkrete, formante tiun malgrandan, senkulpe mortigitan birdeton, por min turmenti despli dolore. Dum la silentaj noktoj mi aŭdas, kiel la birdeto mallaŭte bekas la fenestron kaj mi vekiga. Kaj dum la momentoj de timo kaj malespero, kiam forta doloro enigis la ungojn en mian koron kaj minacas jen-jen rompi mian volforton, ŝajnas al mi, ke mi mem estas tiu malgranda, senpova, malsata birdeto. Mi sentas, ke ia obstina, furioza kaj malprudenta potenco tenas min en la manplato, montras al mi imagon de libereco kaj feliĉo, kaj en la plej proksima momento ĝi povas sen kialo kaj celo fortordi al mi la kapon.

El la ukraina: *Oresto Kuzjma*.

## V I K T I M O J

ROMANO EL LA VIVO DE SIBERIAJ MILITKAPTITOJ

JULIO BAGHY

### DEKUNUA ĈAPITRO

La batalo ankoraŭ daŭris eĉ la barakoj de militkaptitoj, kiam la urbo jam estis okupita. La armeo blanka, komandata de Medvedjuk, jam tramarŝis. Sur la stratoj cirkulis oficir-patroloj kaj ĉeĥaj legioj pasis orienten por bori al si tra malamika bajonetarbaro vojon al la hejmviceno. Ili estis iloj en la mano de reakcio. Viktimoj, kiuj milope mortis por fremdaj interesoj. Ilian patriotismon profitis la sinsekvaj reĝimoj.

La pordegoj de la malliberejo malfermiĝis. Liberigitoj elvenis, longa vico da eskortitaj arestitoj malaperis tra ili. Ĉirkaŭ la pordegoj tumultis popolamaso, kiu jen ĝoje salutis liberigiton, jen blasfeme, minace, pugnoskue teruris arestitojn.

Bardy kaj Doŝky, en apartaj ĉeloj, ekscitite malpaciencaj la tutan tagon. Ili aŭdis malproksiman murmuron de kanonoj,

akrajn pafajn proksimajn, kelkajn en la domo mem, oftajn kaj amasajn paŝojn sur la koridoroj, poste bruon de strata amaso. Io nepre okazis. Jen. Pordoj knare malfermiĝas, pordoj tondre fermiĝas, senkoraj ridegoj, akraj ordonoj, vulgaraj frazoj. Poste silento. La granda domo akceptis novajn gastojn.

Poste ree, ŝlosiltinto. Pordoj knare malfermiĝas. Lego de nomoj. Nomoj de konatoj: ili venas el la ĉeloj, paŝoj ehas sur la koridoro, ili iras for. Kio okazis? Reĝimŝanĝo! Certe reĝimŝanĝo!

Nu, kaj ili? Ĉu ilin oni forgesis?

Bardy estis pli indiferenta, preskaŭ apatia. Sed Doŝky fariĝis ĉiam pli kaj pli nerva. Li kuris en sia ĉelo tien kaj reen, haltis, nervostreĉe aŭskultis, poste ree ekpromenis tri paŝojn tien, tri paŝojn reen. Fine, tute lace li jetis sin sur la litbenkon.

Liaj ekscititaj pensoj komence kaprice saltadis de lia sorto al la sorto de Johano, al la okazaĵoj, eblaĵoj, eventualaĵoj, poste ili moligis kaj karese ĉirkaŭplektis virinan figuron. Eble ŝi jam revenis! Korduŝe li imagis la scenon, kiam ŝi, la patrino, unue renkontos sian perditan fileton. Li vidis antaŭ si la „tigran“, kiu nun certe, eble la unuan fojon dum sia vivo, estas tuŝata de homaj sentoj kaj dankos kore lin. En la okuloj de la patrino brilos la larmoj de l'felice kaj ĉe la adiaŭo li povos kisi sian maneton. Kisi ŝian maneton!... Li ekridetis. „Romantika bovo!“ — li diris mallaŭte al si, kaj li nun ekridis tiel longe kaj forte, ke la larmoj aperis en liaj okuloj. Poste subite li tre serioziĝis. Lia fantazio skizis antaŭ li blondbuklan kapon de knabeto, kiu lin nomis „paĉjo“, al kiu li tiel multe parolis pri la panjo „plej bona el ĉiuj patrinoj, pli bela ol la feinoj de Fabellando“. Fine li jam havas propran hejmon, kun la kara, bela mastrino, kun la kara, bela knabeto. Eĉ! Li diskutas kun ŝi pri la benoj de la alkoholo, kaj kiel facile li lasas sin venki! „Eĉ unu guteton mi ne trinkos plu, mia amata, karega...“ La fantazio haltis: li ja ne scias ŝian nomon. Li elreviĝis, ekstremitis kvazaŭ vekiginte el dormo, ĉirkaŭrigardis. Ekvidante la fenestran kradon, amare li ekĝemis pri sia reala situacio.

Poste li starigis, iris al la fenestreto. La luno arĝentumis la korton. Sur ĝia pavimo kuŝis, aŭ kaŭris homoj, en la mezo staris armita grupo. La ŝafaro kaj la gardistoj.

Premante sian kapon al la krado, Doŝky profunde ekspiris la iom pli freŝan aeron. Subite lian rigardon frapis konata vizaĝo, longbarba, timtaŭzita. Ĉu?... Ne! Li ne konas ĝin. Ĝi nur similas... al tiu de... al tiu de... Lia koro ekstremitis.

Izor! La dokumento! La reĝimŝanĝo! Ho, tiu senkulpa, senhelpa hometo, al kiu nun mankas la sola savilo! Eble en tiu ĉi momento li bezonas ĝin por savi sian vivon.

Kie ĝi estas? Li komencis serĉi en la poŝoj. Eble en la interno de la bluzo? Jen, fine!... Ne. Ĝi estas foto pri la familio Dogler. Li eĉ ne scias, kiam li enpoŝigis ĝin... Jen, eble!... Ne. Dokumentoj de la vera, mortinta Doŝky... Li jam elturnis ĉiujn poŝon. Li devas ĝin trovi, nur sen ekscito! Ne perdi la kapon! Ho, la poŝo estas true! Li ekŝiris la subŝtonon. Nu, jen, — li ekspiris. Elfalis kunfaldita paperfolio kaj malpura, grasmakula koverto.

La Izor-paperojn li levis, metis en apartan poŝon. Nun lia rigardo haltis sur la tere kuŝanta koverto. Ankoraŭ legebla adreso sur la malnova koverto: Al lia *Grafa Moŝto Attila Werečtzy de Veröcze*.

Li ekridis kurblipe kaj levis la koverton, ŝirmalfermis ĝin: elfalis du fotografajoj. Pastro kaj soldato. Poste okpaĝa, dense skribita letero. Li relegis ĝin kaj dume solvigis la kurblipe rido. Li mem skribis iam tiun leteron al bonkora, honesta, trompita viro, al sia patro. Longe li legis kaj relegis, dume ofte rigardante la du fotojn.

— Jen la estinto anoncas sin! — li diris fine. — Haha! Grafa Moŝto! Eh! Ne tentu plu! — Kaj li disŝiris en cent pecojn la leteron kaj la pastran foton, iam dediĉitajn por venĝo.

Mateno jam krepuskis, kiam, post longaj rememoroj kaj ree aperantaj dolĉaj revoj, fine fermis la laco liajn palpebrojn.

Johano havis inkubsonĝon.

Li sin turnadis tien kaj reen sur la malmola litbenko, baraktante. Malvarmaj ŝvitgutoj perlis ĉe liaj tempioj, ofte li ĝemis peze dum dormo.

Li vidis sin vagadi en tombejo. La lunlumo naskis monstrajn ombrojn inter la tomboj. Kaj tiuj ombroj dancis, kaj ŝajnis al Johano, ke ili ankaŭ zumas, zumas ian strangan melodion. Ankaŭ li volis danci kaj kanti laŭ la sama ritmo, sed liaj piedoj ekradikis en la tero kaj la lipoj estis tiel kunpremitaj, ke ili doloris pro la spasma. Ne eble sin movi, ne eble diri vorton. Liaj makzeloj grincis. Doloro, kiel doloro!

Subite li ekvidis, ke sur la vojo venas stranga grupeto: kvar junaj viroj, palaj viroj. Ĉiu tenas sian koron en la mano.

La kvar junaj viroj, palaj viroj proksimiĝas, alvenas. Nun ili ekkaŭras ĉirkaŭ li, en rondo. Nun unu el ili metas la koron al la piedoj de Johano. La ceteraj junaj viroj, palaj viroj faras la samon. Johano sentas akran doloron en sia koro. Li penas ĝin forŝiri. Sed la brakoj ne obeas.

Nun aperas, plimultiĝas pluaj koroj, en longa vico sur la vojo. Kanto tremas. Kantas la koroj. Sed la koro de Johano mutas.

El la malproksimo, aŭreolate de palaj lundradioj, venas blanka feinestajo. Flirte fluas la ora kaskado de ŝiaj haroj, la ombroj, per siaj amorfaj manoj, volas ĉerpi el ĝi. Sed la virino ridas, arĝente, hele, penetre. Johano volas forpeli ĉi tiun arĝentan trilon el la oreloj, sed ĝi tintas obstine, plifor-

tiĝas, jam estas kvazaŭ muĝo de akvofalo, tondro de ĉielo. Doloro, kiel doloro.

Kaj venas la virino. Ŝi paŝas sur la unuan koron, ĝi rompiĝas. Sur la duan, ĉi tiu ekflagras per ruĝaj flamoj; poste sur la trian, kvaran, kiu povus kalkuli ilin. Kaj venas la virino kaj ridas; kaj ridas la palaj viroj, junaj viroj. Sub ŝiaj piedoj el la koroj ŝprucas varma sango kaj sangtoreto kreskas, ŝvelas, altiĝas, jam ĝis ŝia zono. Johano per furioza fortoŝtreĉo alkurus ŝin — ne eble, almenaŭ alkius ŝin — ne eble, ne eble. La sangotajdo kreskas ĝis la kolo, ŝian frenezan ridon sufokas la ŝaumanta ruĝa ondo, kirle kunfrapiĝas ruĝaj ondoj super ŝia kapo. Ne eble savi ŝin! Jam nur en liaj oreloj ehas, zumas, muĝas, tondras la ridego, la ridego de frenezo...

Sira turmento pugnopremis lian koron, li ekskuŝiĝis, kvazaŭ en agonio, la palpebroj malfermiĝis — li vekigis. En la ĉelo — taglumo, sur la koridoroj, svarma bruo. Li levigis, kaj viŝis de sia frunto la malvarman ŝviton.

Li ekaŭskultis. Ekstere oni legas nomojn. Eble nun! Hodiaŭ devas okazi io. Kaj tiam li revidos ŝin. Ŝin, ŝin — ho jes, ŝi kaj ĉiam ŝi, la sole grava por li sur la tero. La hejma fajrujo estas renversita, la venonta sorto estas malcerta kaj duba. Sed pro la perdita estinto, pro la duba, timinda estonto, jen la rekompenco! La baldaŭo, la baldaŭa dolĉa estanto kun ŝi, kun ŝi, kiun li amas, kaj kiu lin... Nevole li rememoris pri sia sonĝo, pri la sonĝvirino, kiu havis la vizaĝon de Katja. Kaj la kvar viroj — ŝiaj viktimoj. Kaj tiu longa vico de koroj...

En tiu ĉi momento li ekaŭdis la nomon de Doŝky. Li saltlevigis, kuris al la pordo, streĉe aŭskultis. Nomoj, nomoj kaj nomoj, nur ne la lia. Pordego knare malfermiĝas, pordegoj tondre fermiĝas. Oni forgesis pri li.

Sur la koridoro, antaŭ la prokurora ĉambro, staris longa vico da viroj kaj virinoj, arestitoj kaj nun liberigintoj. Kvarope oni enlasis ilin antaŭ la revizian komisionon Baldaŭ ili revenis, kaj ĝoje foriris, liberaj. Nur kelkajn, ne politikajn kondamnitajn oni rekondukis en la ĉelojn...

Doŝky estis inter la atendantoj. Nerve li serĉis sian amikon, kaj ne trovinte, penis sin tranĉviliĝi. Eble li estas jam ellasita, eble li baldaŭ sekvos. Oni nun vokis lian kvaron. La vokanto estis la ursostatura, ŝafmiena Ivan Nikolaevič Radĉenko, prokurora servisto. Li volis al Doŝky mallaŭte ion



L. de Paál: Sunbrila montflanko

diri, sed la prokuroro urĝe lin vokis al si per mansigno.

En la vasta ĉambro skribistoj kurbis super skribotabloj. Meze, apud tablo, sidis la prokuroro, Fedor Gabrieloviĉ Morozov. Doŝky apenaŭ rekonis lin.

La maldika, alta viro nun ŝajnis tiel sensignifa, pala, humile ĝentila ke oni apenaŭ povis rekonu el lia sinteno lian gravon kaj rangon. Pleje surprizis Doŝkyn lia mieno kaj lia voĉo. Grandaj, superregitaj emocioj sur la unua, seke raŭka monotono en la dua. Liaj okuloj rigardis lace al la antaŭlistaranto.

Venis la vico de Doŝky. La lacaj okuloj — ĉu nur ŝajno — minace ekbrilis. Nur momenton. En la sekvinta jam maŝine demandis la raŭka, monotona voĉo.

— Nomo?

— Petro Doŝky, militkaptito.

— Nacio?

— Hungaro.

— Naskjaro?

— 1889.

— Religio?

— Roma katoliko.

— Kaŭzo de aresto?

— Konspiro kun la blanka armeo, sed ĉi tiu akuzo...

— Sufiĉe! — li turnis sin al la skribisto. — Absolvite!...

Nu, vi povas foriri...

Doŝky riskis demandon.

— Ĉu mia amiko, Johano Bardy...

— Ĉu vi ne aŭdis? Vi estas libera. Vi povas foriri! — kaj li jam kriis al Radĉenko. — La sekvantan kvaron!

Sed Doŝky ne moviĝis. La prokuro alkriis lin nerve kaj krude.

— Mi ne havas tempon babili. Ĉe la apudporda tablo vi ricevos vian dokumenton...

— Kaj Johano Bardy?...

— Ne via afero! — kaj pugne ekfrapante la tablon, li kriis. — La sekvantan kvaron.

Doŝky, kion fari? — prenis la dokumenton kaj eliris. — Strange impresis lin la bonkora, enigme kompata rigardo de Radĉenko ĉe la pordo. Sed li ne povis paroli kun li.

Sur la strato li traboris sin tra la homamaso tumultanta antaŭ la domo kaj ekiris al la stacidomo. Enpense li paŝadis, klopodis trovi la kaŭzon de tiu malvarma, eĉ ofenda konduto de Morozov. Antaŭ li estis ĉiam tre, eĉ tro ĝentila kontraŭ li. Jes, tro. Nun li rekonis, ke lia afableco estis ĉiam iel altrudita, nenatura, preskaŭ timiga en sia ceremonieco. Tia mielflua konduto ordinare kaŝas hipokritulon, tre ofte malbonulon. Nun, post longe, li ekvidis sub liaj iamaj ĝentilaj kaj riverencoj malicon kaj malestimon... Kaj nun li tute forjetis la maskon? Pro kio? Ĉu Johano faris ion ne honestan? Ne eble. Ĉu nova komploto de Katja? Eble.

Liajn pensojn interrompis konata voĉo.

— Sinjoro Doŝky! Sinjoro Doŝky!

Nun li ekvidis, ke en la mezo de la strato marŝas, en kvaropaj vicoj, trupo de arestitoj. Novaj viktimoj de revolucia dokumentismo kaj multfoje de perforta varbado. Inter ili kriadas malespere al li Izor Steiner, ĝis lin mutigas energia bokspuŝo de la apudmarŝanta oficiro. Doŝky iris al la oficiro kaj alparolis lin.

— Kion vi volas?

— Paroli kun tiu ĉi homo, kaj transdoni al li ion. Li estas senkulpa.

— Ne eble.. Kion transdoni?

— La dokumenton pri lia senkulpeco.

— Ne eble. Jam la duan fojon oni tedas min pro li. Antaŭe ia juda majoro kaj nun vi. Ne povas ekzisti tia dokumento, kiu lin lavas pura. Li estas judo, kaj ĉiu judo estas bolŝeviko.

Tiu ĉi logiko strange impresis Doŝkyn, kaj tio montriĝis ankaŭ sur lia vizaĝo. Lia mieno subite ekincitis la oficiron.

— Kaj vi? Kiu vi estas? Kiarajte vi intervenas? Ĉu ankaŭ judo? Dokumenton, aŭ mi tuj arestos vin. Nu, mi vidu, rapide!

Li nerve forprenis la dokumenton de Doŝky. Sed ĉe la rubriko: „kaŭzo de aresto“, mildiĝis liaj trajtoj.

— Konspiro kun la blanka armeo. Hm. Nu bone. Iru libere.

— Sed, sinjoro leŭtenanto, permesu ke mi transdonu tiun ĉi dokumenton. Li estas vere senkulpa, brava hometo.

— Nu, montru tiun paperaĉon... Eh!... Oni ja ne povas ĝin legi! en kia lingvo oni skribaĉis ĝin?

— Hungare, ĉar per ĝi li volis sin legitimi hejme, post la reveno.

— Ne validas. — Kaj li volis ĝin disŝiri, sed tiam lia ri-

gardo trafis la tremantan Izor. Li ekridis. — Nu, danĝera komunisto li ne ŝajnas. Prenu vian paperaĉon.

Izor preskaŭ kisis lian manon. Poste li grakis, kaj staris en konfuzo, kiel iu volanta ion peti.

— Nu? Kion vi volas?

— Sinjoro kapitano!

— Nur leŭtenanto.

— Pardonon! Mi ne konas la distingajojn. Kaj eĉ se mi konus, mi estas tro malalta por vidi viajn epoletojn, sinjoro. Sed estas pli bone titoli plialte la homojn, ol degradi ilin erare. Mia patro diris al mi tion, kiu estis tre honesta judo kaj ŝameso de nia preĝejo.

— Nu, bone, bone. Kion vi volas?

— Permesu, ke mi diru kelkajn vortojn al tiu ĉi atlestimata kristano.

— Sed rapide, kaj ruse!

— Dankon! Mil dankojn! — kaj li turnis sin al Doŝky kaj ekparolis vortgalope. — Sinjoro Doŝky! Dio vin benu! Dio benu vian honestan koron. La infano. Dio donu al vi kompetence sanon, bonon, feliĉon, longan vivon. Estas en la monaĥinejruinoj. Eble mi havos iam okazon, trans la rivero, rekompenci vian noblecon. Ĝis revido, ĉe sinjorino Lipova

Sed la oficiro bone atentis.

— Kion vi babilis pri infano, ruino, trans rivero?

Doŝky vidis nenian kaŭzon por kaŝi la veron.

— Temas pri la infano de generalo Medvedjuk, kiun ni trovis kaj kaŝis, por savi lin de venĝo. Li nun estas en la monaĥinejruinoj trans la rivero.

La oficiro surprizigis. Poste, ĝoje li premis la manon de Doŝky.

— Tre brave. Rapidu do al sinjorino Medvedjuk. Konsolu almenaŭ la patrinon, se la edzino ja devas funebri.

— Mi ne komprenas.

— En la hieraŭa batalo oni mortpafis ŝian edzon. Iru do, du miaj soldatoj vin akompanos. Kaj pri tiu ĉi escepta judo ne timu, — kaj li frapetis la ŝultrojn de Izor. — Mi pledos por li.

La trupo formariĝis kun la sereniĝinta Izor. Doŝky, kun du soldatoj, ekiris kontraŭan direkton al la rivero.

Li ree enreviĝis; profundiginte en siajn pensojn li apenaŭ konsciis pri la vojo, pri la boatveturo tra la rivero. Medvedjuk mortis. Tiu martira virino do liberigis de sia inkvizitoro. Ho kiel li malamis tiun bruton, la kruelan iaman komandanton de la barakurso. Kaj — eble ne tiom pro liaj kruelajtoj, ol kiom pro la larmoj, kiujn li tiel ofte vidis en la okuloj de lia kompatinda edzino. Nun ŝi ne devos plu toleri liajn beste kruelajn kapricojn, ĉion bele aranĝis la bonfara kuglo. Certe ĉi ekspiris pli libere!... Sed... se ne!? Se ŝi amis lin tia, kia li estis? Kaj la orfa knabeto, kiu estas nun peza tasko por la sensubtena virino! Kaj li, senpovulo, kiel li povus helpi ŝin? Ĉu li rajtas sin enmiksi en ŝiajn aferojn? Kial li supozas ĉe ŝi simpatio? Ŝi eble eĉ ne konas jam lian vizaĝon. Ĉu fari amkonfeson ĉe la katafalko? Ĉu ĉasi por ŝi ĝojon inter tiom da malfeliĉoj? Honte, honte! — Kaj Doŝky sincere malŝatis sin en tiu ĉi momento. „Kiel triviale, kiel memame!“ — li riproĉis sin. Kaj li ne ŝparis al si tiajn titolojn, kiel „romantika bovo“, kaj „sentimentala hipopotamo“.

Furioza hundbojado interrompis lian moralpredikon al ŝi. Ili proksimiĝis al la duonruina monaĥinejo, en kies loĝeblaj partoj rifuĝis almozuloj kurbdorsaj, pintmentonaj maljunulinoj. Neniu zorgis pri ili, ili povis tie trankvile vivi kaj kviete morti.

La hundbojado alarmis la loĝantojn. Kelkaj maljunulinoj elvenis tra la pordo kaj terurite rigardis la suspektindan triopon.

— Dio mia! soldatoj! Sankta Virgulino nin gardu! — flustris la unua

— Jesuo, Maria! Certe ili eksciis pri la rifuĝintoj! — eĥis la dua.

— Pss! Silenton! Nenion konfesi!

— Eble ili venas por...

— Fermu la buŝon! Ni akceptu ilin dece!

Kaj la plej maljuna maljunulino klopodis kiel eble afabligi sian sulkon vizaĝon.

— Estu sana! Estu sanaj, sinjoroj! Al kio ni danku la honoron, kolombetoj.

— Malgrandan knabeton ni serŝas. Tie ĉi li devas esti, ĉe sinjorino Lipova — respondis Doŝky.

— Neniame mi vidis tie ĉi knabeton, kolombeto. Neniu el ni vidis, ĉu ne? Neniu, neniu. Oni vin trompis, kolombeto, oni vin erarigis, kredu min.

— Ne eble. Tie ĉi li devas esti. Blondkapa knabeto. Lia

— nomo estas Ivaĉjo. Li estas du-jara. Ne timu min, diru do sincere.

— La plej maljuna suspekto esploris la eksteraĵojn de Doŝky.

— Ĉu vi estas militkaptito?

— Jes.

— Envenu do. — Si kondukis lin internen de la pordo.

— Vi estas do la patro?

— Jes.

— Sed la soldatojn ni timas, pro la patrino de la infano. Vi ja scias, kial.

— Jes, — diris Doŝki, kvankam li vere ne sciis, kial.

— Ne estus bone, se ili vidus, en tia febra stato...

— Ĉu la infano estas malsana?

— Ne; la patrino.

— Patrino!

— Jes. Si vundiĝis en la hieraŭa batalo.

Doŝky neniam komprenis, sed tiom pli scivolis. Li elkriis al la soldatoj.

— Sinjoroj, post momento mi revenos.

Kaj li ekiris, post la maljunulino, tra malpuraj koridoroj. Ĉe pordeto ili haltis.

Post pluraj frapetoj, demandoj: „Kiu estas“, intertraktoj tra la pordo, fine la pordon oni malfermis kaj Doŝky venis en sufokan odoron de putrantaj terpomoj kaj brasikoj, en veran kabanon de mizero. La fenestroj, kovritaj per porkveziko, apenaŭ enlasis sufiĉan lumon por vidi la nerabotitajn meblojn, la strate kolektitajn ĉifon-ornamaĵojn. Kurba avineto estis en la ĉambro, kaj maljunulo, kies tuta vizaĝo estis plena de abomenaj ulceroj.

— Ĉu vi venis al via edzino? — demandis dubeme la avineto.

— Jes, jes! Li venis al ŝi, — certigis la maljunulino ĉe la pordo.

— Bone, bone! Kaj al la knabeto. Kiel oni nomas lin?...

— faris la avineto ankoraŭ naivan provon.

— Ej, ej, vi ne fidas min. Diru al Ivaĉjo, ke paĉjo Doŝky venis, — ridetis Doŝky.

— La avineto ekridis, vigliĝis, parolemiĝis.

— Ho, Ivaĉjo, bravuleto! Vi estas do paĉjo Doŝky. Jesuo, nun mi vidas, kiel li similas vin!

— Kie li estas?

— Tuj, tuj! Venu! Li estas en la paradizo. Tiel ni nomas la ĝardenon kun la kapeleto. Venu do.

Denove kondukado tra koridoroj, teda, trodolĉa parolo dume. Fine ŝtuparo al pordego. Al la pordego de la „paradizo“.

Tiu ĉi „paradizo“ konsistis el kelkaj mallerte faritaj florbedoj, kelkaj arboj kaj el kapeleto en la kortangulo. Sed Doŝky estis kontenta pri ĝi, ĉar li ekvidis la blondan kapeton de Ivaĉjo, kiu faris fortikaĵojn en la malseka sablo. Sed en la sekvinta momento li jam pendis je la kolo de Petro.

— Paĉjo Doŝky! Paĉjo Doŝky!

Kaj paĉjo Doŝky alpremis la etulon al sia brusto kaj kisigis, kisigis lin.

La etulo, post la pikaj kisoj, viŝis siajn vangojn. Poste li kaptis la manon de Doŝky kaj tiris lin.

— Venu! Panjo Fiza estas malsana.

— Fiza? Ĉu ŝi estas ĉi tie?

— Ho, kolombeto, ni diris ja! La ĝojo konfuzis vian kapon! — miris la avineto.

— Jes, jes! Ni iru al li, — diris embarasite Doŝky, kaj lasis sin tiri de la knabeto en la kapelon. La du maljunulinoj kun maljuna ĝojo, kapbalance postrigardis ilin.

La kapelo estis establita per litoj kaj tabloj. Ĝian antaŭan destinion montris sole la altarbildo, eĉ tiu terure difektite. Kristo kun flama koro. Sed en la koron vandala mano puŝis tranĉilon kaj fendis ĝispiede la tolon.

Sur unu lito ridetis, renkonte al Doŝky, Fiza.

— Ĉu Katja sendis vin? — ŝi demandis unue, etedante la manon.

— Katja scias pri la afero?

— Certe. Mi rakontis al ŝi ĉion...

— Vi kuraĝis fari tion? Vi ja scias, ke ŝi reprenis la dokumenton de la infano, ŝi plektis komploton kontraŭ ni, ŝi arestis nin... Vi mem malamas ŝin... Mi ne komprenas... Enigmo, enigmo...

Fiza malgaje ridetis.

— Enigmo estas ĉiu virino, kiun oni malhelpas en sia amo. Trakviliĝu! Ni miskomprenis ŝin... Ŝi estas bona, tre bona... Ŝi amas Johanon pli ol sin mem. Ŝi ne estas vengema. Vengema estas iu alia. Tiun mi timas. Ŝin ne...

— Sed kial arestigi nin?

— Trioblan celon ŝi havis: savi Johanon kaj liajn amikojn de danĝeroj de la hieraŭa rekrutigo kaj batalo kaj vekti simpatian al la revenintoj al vi kaj fine pruvi ŝianamon al Johano. Ĉu ankaŭ Bardy liberigis?

— Ne. Pli ĝuste, mi vere ne scias. La prokuroro ne estis en ĝusta humoro. Li rifuzis la respondon.

— Kial do? Kio okazis?

— Nenion mi scias. Mi devis alrapidi por la knabeto. Lia patrino jam estas hejme.

— Kaj la patro?

— Li mortis.

Fiza ekĝemis.

— Kial ne la prokuroro? — ŝi diris post iom da paŭzo. Kaj ne atentante pri la konsternita Doŝky, ŝi subite ellitiĝis kaj komencis sin vesti rapide.

— Kien vi volas?...

— Iri. Tuj iri. Kun vi. Al la prokuroro. Mi timas. Tiu homo. Li estas malica, vengema. Li havas potencon en la manoj.

— Fiza! Vi ja estas vundita!

— Ne grave! Nur la muskolon traboris tiu stulta kuglo, kaj iris diablo scias, kien...

— Sed la vundo doloras! Vi febras!

— Ne grave! Mi havas bandaĝon.

## POEMOJ DE JOHAN LIIV.

(1864—1913)

### Ekteksas la virinoj

*Ce teksil' okupas  
la virinoj sin.  
Mia pensteksajo  
ŝvebas en proksim'?*

*Ruĝis ĝi kaj blankis,  
ĉielbluis ĝi;  
Koron enpenetris  
steloj, sunrad'.*

*Ho, la pensteksajo,  
estas ja sen fin'!  
Ho, la pensteksajo  
estas ja sen lim'!*

*Disŝirigis sentis  
mi ĝin kun dolor'.  
Jam milfoje pro ĝi  
ektremadis kor'.*

*Jam sangeruĝis  
ĝi pro emoci',  
iam neĝeblankis,  
helebluis ĝi.*

*Pecojn mi flugadi  
vidas en la vent'.  
Kelkajn mi nun trovas  
kun feliĉa sent'!*

### Johanvespero

### Autuno

*Mi rave haltas pro admir'  
ekbrilas en la ros' lampir'!  
Kvieta nokt'. Pro kantsonor'  
de l'junulin' ekvibras kor' —  
feliĉe mi aŭskultas.*

*Sablo teda, kampo nuda,  
supre la nubar';  
erikejon mi atingas  
apud la arbar'.*

(post dek jaroj.)

*Mi kvazaŭ hundo sen ripoz'  
Kuradas en malseka ros'.  
Ho, kiel kuloj pikas min'  
Kantaĉas radŝpinile in' —  
diablo, kial brui!*

*La velure verdaj pinoj,  
eta vojo nur:  
la pinarboj heleverdaj,  
ora la betul'!*

*La pinarboj heleverdaj,  
ora la betul'!  
Erikej' en brakojn  
jalas al aŭtun'.*

### Falis foliar'.

*Ekondadis la akvar',  
onden falis foliar':  
ondo estis cindrogrizaj,  
la ĉielo plumbogriza,  
cindogriza la aŭtun'.*

*Tio konformis al la kor',  
plena je sento cindrogriza,  
la ĉielo plumbogriza,  
cindrogriza la aŭtun'.*

El la estona: HILDA DRESEN

— Sed soldatoj staras ekstere.  
— Soldatoj? Ĉu por traserĉi?...  
— Ne, ne! Ili venis kun mi, bonvolaj. Sed via bandaĝo estos suspekta al ili. Vi estis ja soldato.  
Fiza obstine kapneis.

— Nenio gravas. Mi devas iri al Morozov. Li estas kruela homo... vengema.

— Nu ĝuste pro tio. Vi neniom helpus, nur kurus en danĝeron. Atendu, ĝis la vengemo satigos. Fiza, havu prudenton.

Sed Fiza, forpuŝante de si Doŝkyn, ekridis. Strange, enigme, minace.

— Nenio gravas. Mi iros... mi iros...

Nun alvenis la du maljunulinoj. Doŝky petis ilin pri helpo. Oni devis lukti kun Fiza por ree enligi ĝin. Kaj poste, post la multaj persvadoj, konsoloj, trankviligoj, — ŝi subite ŝovis sian kapon inter la kusenon kaj esploris, esploris singulte, skuigante en sia tuta korpo.

Doŝky staris senkonsile. Resti li ne povas plu, la soldatoj jam certe malpacienas. Malfeliĉa Fiza, en sia freneza amo ŝi volas sin oferi. Kian danĝeron ŝi antaŭsentas por Johano? Kaj kiel ŝi do volas malhelpi ĝin? Kion fari? Resti li jam vere ne povas, ĉar eble la soldatoj jam serĉas lin, kaj tiam li trovos Fizan. Li devas rapidi.

— Adiaŭ, Fiza! Trankviliĝu, havu prudenton! Kaj vi, avinjoj, bone gardu mian edzinon! — li kriis, kaj preninte la knabeton sur la brakon li ekkuris eksteren. Gustatempe! La soldatojn li renkontis jam en la koridoro.

Post unu horo li jam staradis antaŭ la domo de Medvedjuk. Nur kelkaj paŝoj ĝis la pordo, tamen ĝi ŝajnis al li neatingebla malproksimo. Tra la barilfendoj li ŝtelrigardis en la korton. Neniu tie. Meze de l' verando mebloj, unu sur la alia, verŝajne en ilia loko staras nun la katafalko. Nigra drapiro super la pordo, ambaŭflanke longkruraj kandelinoj. Tra la malfermita pordo vidiĝas nigra profundo. La pordo ŝajnas kadro sen bildo.

Kaj nun la amflugila fantazio de Doŝky aperigis en tiu ĉi kadro anĝele mildan, malĝojan portreton. Ho, li nun ĝojigos ĉi tiujn karajn, lacajn, turmentitajn trajtojn. Jes, li portos, al ŝi konsolon.

Tamen, li ne kuraĝis tuŝi la anson. Se almenaŭ iu venus, kondolencanto, aŭ servisto, por demandi, kial li staras tie.

La knabeto enuis la silenton. Por distro li boris trueton en la troflikita pantalone de paĉjo. Li ridetis al la helblue nerazita, rigida, pala vizaĝo, sed tiu ĉi nun ne respondis lian rideton, eĉ li vidis, ke sur tiu ĉi vizaĝo ruliĝas larmoj. Kaj tiam ektordigis ankaŭ lia eta koro, kaj forte alpremante sin al la kruro de Petro, li petegis.

— Paĉjo Doŝky, paĉjo Doŝky... Ivaĉjo amas vin... Ni iru, nu, ni iru... ne ploru...

Vere, Doŝky jam decidigis sin iri, sed nun li ekaŭdis parolon, konsolvortojn kaj ekvidis en tiu kadro realan portreton, mem la funebrantan vidvino. Kun lacaj sekaj okuloj ŝi rigardis antaŭ sin, la trajtoj estis ellongigitaj, dolore rigidaj, la sinteno humila, submetiĝinta al la sorto. Ŝi mute aŭskultis du kondolencantajn virinojn, poste, adiaŭante per kapklino, ŝi reiris en la domon.

Doŝky sin kaŝis malantaŭ dika arbo. Li konis la du virinojn. Oficiredzinoj.

Ili haltis por momento antaŭ la pordo kaj, unu kun oftaj ekĝemoj, prenis el sia retikulo pudroflanelon kaj speguleton.

— Vi eĉ ne imagas, kiel terure min impresas tiu ĉi afero! — ĝemis la unua, kaj dume lerte manovrante per la flanelo, ŝi malaperigis la postsignojn de la laŭkonvenaj larmoj. — Sed, mi devas konfesi, min surprizas la senkoreco de Jenja.

— Kial?

— Ŝi eĉ ne ploras.

— Ŝi neniam amis lin.

— Ne kredeble! Li ja estis tre riĉa! — ŝi miris preskaŭ konsternite, poste, lastfoje sin rigardinte en la speguleto, ŝi fermis la retikulon kaj brakplektis je sia amikino. — Ni rapidu, kara. *Simon* jam atendas min.

— Kaj via edzo?

— Eh! — ŝi klakelis ignore per la lango. — Li amuziĝas ĉe Zina.

Doŝky, kun sia kutima grimaco, malŝate rigardis post la forrapidantoj. Poste subite li ekskuis sin, kvazaŭ forskuante la malagrablan efikon, kiun faris al li *ŝia* nomo en *iliaj* buŝoj.

Fine decidiginte, li kaptis la manon de la knabeto kaj eniris la korton. Antaŭ la nigra pordo li haltis.

— Ivaĉjo kara! Aŭskultu! Paĉjo Doŝky tuj revenos. Li

tuj revenos, kaj tiam... hoj, kiel bone estos al vi! Nu atendu bele! Tuj mi revenos.

Kaj li paŝis en la ĉambron. Li haltis. Antaŭ li, sur katafalko, inter flagrantaj kandeloj kuŝis Medvedjuk, kvazaŭ dormante. La morto plibeligis lin.

Doŝky estis sola. Piedpinte li proksimiĝis kaj longe rigardis. Poste mallaŭte kaj tre milde li alparolis la mortinton.

— Antaŭ du jaroj vi skurgis min, ĉar mi svenis dum lignohakado en via korto. Ĉu vi memoras, Medvedjuk? Nun mi reportis vian perditan fileton. Ne koleru, Medvedjuk. Permesu al la kraĉita, piedpuŝita militkaptito, ka li portu konsolon al via edzino. Ne koleru. Medvedjuk, kaj dormu paco.

Kaj sur la kordoj de la infana kredo, kun kristana pardonemo, ekpalmis el lia animo — la rifuzita pastro, la vera servisto de Kristo.

Post longe li levis la kapon.

Kaj lia rigardo renkontis tiun de la virino, staranta en flanko pordo. Estis videble, ke ŝi penadas rememori lian vizaĝon. Subite facila ruĝo kovris ŝiajn vangojn. Ŝi divenis. Ĝi estas tiu vizaĝo, de longe ne vidata, kiun li iam ĉiutage vidis en barakfenestro. La sama revesprimo en la mieno, la sama sindono en la okuloj, la samaj doloraj, sed moligintaj trajtoj, la noble alta frunto... ĉio la sama. Dum momento ŝi revivis longan tempon en imago: kiomfoje ŝi rifuĝis tiutempe al la fenestro, por kaŝe vidi tiun vizaĝon, ĉerpi konsolon el ĉi tiu komparte dolora rigardo, kiam ŝi sentis sin tre sola, tre subpremita. Poste, jes, ankaŭ poste, multfoje mankis al ŝi tiu ĉi vizaĝo. Kaj nun, en la horo de dolora soleco, denove ĝi aperis antaŭ ŝi.

Pro strangaj sentoj, surprizo, konfuzo ŝi ne povis ekparoli iometempe. Doŝky proksimiĝis kelkajn paŝojn. Tiam ŝi ekparolis.

— Kion vi serĉas tie ĉi?

Sed la vortoj ŝajnis al ŝi mem tro krudaj. Ŝi koleris je si. Kial ŝin ne obeis ŝia voĉo kaj sonis tiel seke, senkore?

Doŝky embarasiĝis. En la centfoje imagita, revita kaj projektita momento li tamen ne trovis la ĝustan frazon. Li staris mute kaj du grandaj larmoj ekvidis en liaj okuloj.

La virino, kvazaŭ pro interna instigo, paŝis al li, kaj sian manon mole metis sur la lian, kiu treme tenis la ĉifitan soldatĉapon.

— Kial vi venis nun? — ŝi demandis. Ŝin mem surprizis la intima varmo, kiu vibris en ĉi tiu indiferenta frazo.

— Gojon kaj konsolon mi portas al vi, — diris Doŝky kvazaŭ en sonĝo.

— Strange, kaj denove vi! — ŝi diris, plie al si mem. La tuta sceno ŝajnis al ŝi iel fabela, nereala. Nun, unu el la grandaj larmogutoj falis sur ŝian manon. Ŝi rekonsciigis kaj retirigis.

— Mi venis redoni al vi vian fileton, — daŭrigis Doŝky. Ŝiaj okuloj streĉe malfermiĝis. Senkomprene ŝi rigardis. Poste treme kvazaŭ time ŝi balbutis.

— Fileton?... Ĉu... mian... fileton...

Doŝky mute kapjesis.

— Ĉu li vivas? Dio, Dio! Ne prenu mian menson!

— Li vivas. Li estos baldaŭ ĉi tie.

Cerbŝire ŝi ekkriis. Poste, subite, ŝi jetis sin sur la ŝtupojn de la katafalko kaj singulte, plorege kriadis.

— Li vivas! Li estos baldaŭ ĉi tie! Ĉu vi aŭdas, vi, kruela! Dio redonis lin... Dio redonis lin. Li vivas... Li vivas...

Doŝky ŝtelis sin el la ĉambro kaj revenis kun la knabeto. Li kondukis lin al la duonsvena patrino. La knabeto time prenis sin al Doŝky.

— Nu, diru, kara! Nu, diru! — instigis Doŝky flustre lin.

La pura infanvoĉo ektintis, kvazaŭ kristnaska sonorileto.

— Panjo kara, ne ploru...

Je la voĉo, la patrino subite levigis. Freneze ŝi prenis al si la infanon kaj ride kaj plore, kvazaŭ frenezulino, ŝi kriadis.

— Fileto... Mia fileto... Parolu... Fileto kara... Vian voĉon mi volas aŭdi... Fileto... Kara...

La knabeto, terurite de ĉi tiu sentorento, laŭte esploris. La patrino plitrankviligis, viŝis liajn vangojn, donis al li stultajn nomojn, lulis lin, kisis lin, karesis lin...

Kaj Doŝky staris senmove kaj rigardis la mortinton. Ŝajnis al li, ke tiuj severaj trajtoj forpelis lin: Kion vi serĉas tie ĉi? Vi faris vian devon. Vi estas superflua en tiu ĉi domo.

Kaj senbrue, sur piedpintoj, li forlasis la ĉambron, la domon kaj ekmarŝis al la militkaptitejo. Granda trankvilo, korkaresa ĝojo, dolĉe prema doloro miksiĝis en lia animo. Kun stranga, reve moka rideto li diris al si.

— Jen, vi, romantika bovo! Tamen vi ne kisis ŝian maneton.

(Fino sekvos.)



# PIERROT KAJ COLOMBINE, AŬ LA MALĜOJA KOMEDIO DE LA MARKIZO

JULIO PEKÁR

**M**i opinias ke neniu el vi kontestos la poetan destinon de *Monsieur de Saint Aubin*. Tiuj delikataj madrigaloj, pastoraloj kaj ravaj komedioj, kiujn li verkis por amuzi la sinjoran societon, ne nur akiris por li gloron, sed eble ankoraŭ pli multe da laŭroj ili plektis ĉirkaŭ la fronton de la markizo, ol kiom bone aspektis al lia peruko „kolombflugila“.

Nu, sed ni ne forgesu, ke propre la Muzoj estas sinjorinoj, ke nia glora reĝo, por tiel diri, levis ilin je nobela rango kaj donis al ili *tabouret*-rajton en sia salono, — ni estu do ĝentilaj al ili!

La sinjoro markizo iom eble eĉ transpaŝis la limojn de l' nobeleco. Li ekkonkuris kun skribistoj kaj plumknaŝistoj kaj verkis poemojn, kio eble decas por tiaj simplaj burĝoj, kiel sinjoroj *Racine* aŭ *Molière*, sed ne decas por *Monsieur de Saint Aubin*. Tiu sola cirkonstanco servu por lia senkulpiĝo, ke ne ordinara profitemo inspiris lian poezion, sed vere alta celo: la amuzo de la reĝo kaj de *Madame de Pompadour*!

Ĉu ekzistas pli alta celo ol ĉi tiuj. Kaj se iu sukcesis forpeli, eĉ se nur por unu forflugema vespero, la majeste senfinan enuon de nia reĝo, ĉu tio ne estas inda merito por la senmorteco?

Jes, la sinjoro markizo estas sendube senmorta — kaj se la Parnason ni imagas tiel bondeca kortego, kia Versailles, ni povas esti konvinkitaj ke sinjoro de Saint Aubin ĝuas tie ne burĝan, sed konvenan por lia rango kaj nobelan senmortecon!

Sed se estis iu, kiun ne ebruiĝis sia propra gloro, kiu ĉiam povis surporti kun hontema eleganteco la laŭron ĉirkaŭ sia frunto, certe nia favorinda amiko estis tiu. Efektive, la markizo estis eksterordinare modesta, preskaŭ ĝis timemo.

Kun sia malĝoja rideto ĉiam tiel li iris-venis en la societo kvazaŭ li estus en sonĝo. Foje la reĝo vere tiel alparolis lin:

— Ĉu vi permesas, ke mi veku vin, Monsieur de Saint Aubin? . . .

Li pli amis la solecon de arbaroj kaj kampoj ol la versailles'an salon-vivon, do la solecon, kio certe estas malĝentilo, ĉar oni neniam devas sin rigardi tiel sprita, ke la societon de si mem oni preferu al la societo de aliaj.

Nu, sed ni povas pardonj al li tiun ĉi ŝajnan malĝentilon, ĉar ankaŭ en la soleco de boskoj propre li ne estis sola, sed en la societo de la plej belaj kaj plej spritaj damoj: la Muzoj.

Multajn kortuŝis la delikataj virtoj de la markizo, sed ankaŭ multaj nur amuziĝi povis je liaj strangaĵoj. Al la lastaj apartenis la sinjorinoj.

Kiom sukcese kortumis sinjoro Saint Aubin la muzojn, tiom malmultan ŝancon li havis ĉe la vivaj sinjorinoj. Se iu virino lin alrigardis, tuj nedireble konfuziĝis nia milda markizo! . . . Kaj la virinoj ja ne ŝatas tion. Niaj paŝlistinoj prefere tion pretendas, ke ilin oni konfuzu!

Vane, ĉi tion, ŝajnas, ne kapablis nia amiko, — ne estis en li tiu kara aŭdaco, sen kiu la sinjorinoj neniam povus ĝui la distrajn ĝojojn de l' venkiteco dum la paŝlistaj horoj.

Kvankam, ĉu mi diru, ke sekrete ne estis pli amema homo en la mondo ol Monsieur de Saint Aubin? Revema poeto li estis kaj la virino estis la sola penso de lia vivo.

Kompatinda markizo! Ĉu li sciis ke la timemaj animoj similaj al li neniam povas havi ŝancon por la dolĉa feliĉo. — maksimume nur por la ama ĉagreno? Li ĉiam

esperis ke fine tamen li trovos la paŝtistinon de sia koro — li esperis kaj verkis; verkis siajn poemojn kaj komediojn.

Iun tagon la reĝo demandis lin kun bonvola interesiĝo, kial li ne provas ankaŭ la heroan poezion kaj kial li ne verkas tragediojn laŭ la modelo de sinjoro Corneille?

Monsieur de Saint Aubin embarasiĝis pro la neatendita manifesto de la majesta bonvolo kaj larmoj ŝtelis sin en liajn okulojn. Emociite li promesis ke la proksiman fojon li verkos tragedion . . .

Nu, vi demandas min, ĉu li tenis sin je sia vorto? Jes kaj ne, kiel ni volas! La milda markizo ne titolis tragedio sian lastan verkon; komedio ĝi estis, sed kiel vi vidos, lastmomente li ŝanĝis ĝin. Lastmomente vere tragedio ĝi fariĝis . . .

„*La feliĉa Pierrot*“; ĉi tiu estis la titolo de la lasta verko de sinjoro Saint Aubin. Propre delikata pastoralo estas ĉi tiu komedio. Neniam pli ameme kaj seife kaptis la rimon la plumo de l' markizo, ol ĝuste en ĉi tiu verko.

Subtile simpla estas la strukturo de l' tuto, sed tiom da sento pulsas en ĝi, ke abunde kompensas ĉi tio la mankon de la tro konsciaj poeziaj artifikoj.

La lukton de la vera amo kun la intrigo kaj la finan triumfon de l' fidelo figuras la teatraĵo. Inter ĝentilaj paŝlistoj okazas la tuto.

En la komenco de l' komedio en pasia sceno pentras la markizo la amon de *Pierrot* kaj *Colombine-Bergère*, kiuj, inter siaj ŝafidoj, en la brakoj unu de la alia, ĵuras eternan fidelon. Nedireble feliĉaj; kaj restus ja sennuba ilia



L. de Paál: Arbara profundo

ĉielo, se dum la foresto de Pierrot la malica Arlequin ne ekdezirus la dormantan paŝtistinon. Per atenca kiso li vekas Colombine, ŝi malesperiginte rifuzas lin, sed Arlequin ne cedas. Li komencas la tentan laboron de l' delogo. En diversaj maskoj li vizitas la paŝtistinon. Li aperas kiel riĉega komercisto, kiel almozulo, kiel ermen-mantela reĝido kaj fine kiel trubaduro...

Colombine fidele rezistas kaj nur tiam ŝi ŝanceliĝas por momento, kiam la trubaduro Arlequin logas ŝin en sia dormo per tiu kanto, per kiu Pierrot gajnis ŝian koron.

Ŝi kredas ke Pierrot vokas ŝin, li estas apud ŝi... kaj sinforgese ŝi klinkiĝas sur la kolon de Arlequin.

Pierrot tiam alvenas hejmen kaj vidante Colombine'n en la brakoj de aliulo, malesperiginte li ekmigras en la mondo. Nedirebla estas lia ĉagrenon, sed kiel fidela paŝtisto, li ankoraŭ ĉiam esperas.

Kiam falinte sub arbo, per kortuŝaj versoj li deklamas sian ĉagrenon, la flugila, eta Amoro venas antaŭ lin kaj anoncas ke Colombine, lin serĉanta kaj priploranta, jam trovis liajn postsignojn kaj tuj ŝi estos apud li. Pierrot vekigas kaj lastfoje li volas provi la paŝtistinon. Ŝajne li pikas ponardon en sian koron kaj tiel li atendas la karulinon.

Per la kortremiga vekrio de Colombine li konvinkiĝas

pri sia fidelo. La paŝtistino genuas apud li, preĝas al la dioj, ĉar ŝi kredas ke per siaj kisoj ŝi revivigas Pierreton. En ĉi tio, kompreneble, ŝi sukcesis. La ŝajna sinmortiginto ne lasas longe nereciprokitaĵ la kisojn de l'amatino. La eraro solviĝas kaj la geamantoj repaciĝas. Tiam ree aperas la eta Amoro kaj kondukas antaŭ ilin la ligitan kulpuilon: Arlequin-on. Li vokas al Pierrot, ke li juĝu pri li. Colombine volas kondamni la atenculon je morto, sed Pierrot noble pardonas lin, dirante:

— Iru vian vojon, Intrigo, la Amo pardonas vin! Mi venkis vin! Plu vi ne povas malutili al mi...

Sed ĉi tiu estas nur la teatraĵo, — vi diras — kie estas malantaŭ ĝi la romano de la milda markizo? En unu vorto vi povas legi ĉi tiun romanon, nur rigardu la titolpaĝon de la unua eldono de l' komedio. Vi legos tie ke la teatraĵo estas dediĉita al *Madame la Vicomtesse d'Artigny*...

•  
Mi opinias, vane ni cerbumus, kio igis Madame d'Artigny-n je tio, ke ŝi rimarku la mildan markizon. Kio povis interesi la plej koketan korteganinon de *Trianon* en tiu pala, revema poeto, pri kies embaraso tiom amuziĝis la sinjorinoj?...

Estas eble, ke post la scienca ama arto de princo Richelieu la incito de novaĵo tiris la vicomtesse'n al la markizo, — estas eble ke nur por komparo ŝi koketis al li, sed ankaŭ tio ne estas neebla ke por momento vere ekplaĉis al ŝi sinjoro Saint Aubin. Sed miaparte mi kredas ke ne decas akuzi la vicomtesse'n per tio ke tiom ŝi estus forgesinta pri si!

Madame d'Artigny estis tro ambicia kaj post marŝalo Richelieu ŝi volis plaĉi al la reĝo. Jes, sed estis malfacile altiri la reĝan atenton!

La vicomtesse tiel opiniis atingi sian celon plej bone, se en ia ĉarma rolo ŝi povas sin prezenti antaŭ lia reĝa moŝto sur la scenejo de la *petits cabinets*.

Sed kiu verku por ŝi ĉi tiun rolon? ... Tiam ŝi elokumis la markizon.

Ne necesas diri ke sinjoro Saint Aubin ne estis peza ĉasaĵo. Kiam la poeto vidis ke fine troviĝas virino kiu ne ridetas je lia timemo kaj embaraso, kiu ne evitas lin, sed konvertiĝinte el la vantaĵoj, ameme ŝi aŭskultas liajn vortojn, — ĉu ne kompreneble ke tiam li rekonis en ŝi sian de longe priveritan paŝtistinon? Dum kelkaj semajnoj li fariĝis tute la sklavo de la vicomtesse!

— *Bergeronette*, — li flustris foje, genuante antaŭ ŝi, — ho, diru, kiam vi jam indulgos min?

— *Mon berger*, — respondis la vicomtesse ridetante, — tiam, kiam en bela poemo vi prikantos nian amon...

Ĉu mi diru ke sinjoro Saint Aubin sentis sin tro feliĉa ke ĉi tiun ĝojon li povis fari al sia idolo? Li eksidis kaj verkis kun ekstaza entuziasmo sian *Feliĉan Pierroton*.

Tial ĝi estas tiom delikata, tiom ĉarma, ĉar sian tutan, senfinan amon li enspiris en ĝiajn rimojn, kiom li nur sentis al la falsema vicomtesse.

•  
Mem la aminda kardinalo Bernis trarigardis la teatraĵon kaj akceptis por la reĝa malgranda scenejo.

Temis pri la roldivido: Madame d'Artigny estus ludinta Colombine-Bergere'on, kaj la markizo Pierrot'on. Sed kiu ludu Arlequin-on?

La poeto empeniĝis. Li estis feliĉa kaj li ne bezonis plu publikan triumfon, sed kun certa naiva vengemo tamen li volis ke la rolon de la *venkita Intrigo* ludu tiu sama rivalo, de kiu li konkiris sian paŝtistinon.

Kompatinda markizo! Se mi diras al vi ke ĉi tiu ŝajne venkita rivalo estis kavaliro Riom mem, mi kredas, ankaŭ vi jam antaŭe tutkore kompatos sinjoron Saint Aubin.

Eĉ la plej koketa virino havas malfortan flankon, kie ŝi estas samtiel sendefenda, kiel la plej sensperta knabino. Nu, se la tuta vira mondo estis la sklavo de la vicomtesse, — al ŝi diktis la kavaliro. Sekrete ĉi tiun diable ruzan kon-

## LEGENDO

Pluvarma vento arbojn skuas, skuas...  
kaj ŝtizon de patrin' kuracas frua mort'.  
La karan hejmon — mem la viv' detruas;  
malsata Joĉjo plendas jam ĉe fremda pord'...

Pluvarma vento arbojn skuas, skuas...  
jen tago de l' Mortintoj: festo de l' tombej'.  
Florpompo. Kandelbriloj. Pio bruas;  
ĉe tomboj preĝmurmuras burĝo kaj plebej'...

Pluvarma vento arbojn skuas, skuas...  
la orfa Joĉjo en tombejo vagas nun.  
Malplenaj manoj... Salaj larmoj fluas:  
„Al vi, patrinjo, nek flore!... nek kandellum'..."

Pluvarma vento arbojn skuas, skuas...  
florpompa tomb' kun kandelar' haltigas lin.  
Preĝmetas manojn Joĉjo kaj genuas:  
„Vi, riĉa tomb', donacu tom por patrin'..."

Pluvarma vento arbojn skuas, skuas...  
la tomb' silentas... Kor' ne batas sub marmor',  
sed jen — miraklo kredi lin instruas;  
sur panja tomb' — kandelo flagras, pompas flor'...

## MIA REĜLANDO

La lando estas ĉambro kaj reĝo — mi sen kron', sed el reĝin-okuloj rebrilas al mi tron'. Orblondaj ondaj haroj servadas por mantel', nektar' min ebriigas: la vin' de kismiel'.	Popolo estas — bubo, tre vigla brava knab', rajdante sur genuoj li estas — tuta stab'. La sceptro estas — vergo kaj kiel saĝa reĝ', mi batas la popolon, se tedas lin — la leg'.
--	---

Sed se maten' krepuskas  
kaj krias kok' en kort',  
ekmigras tuj la reĝo  
el lando sen eskort'.  
Dum la reĝin' fabelas:  
„Trans... granda ocean'..."  
la reĝo kuras vane  
por — ĉiutaga pan'.

Julio Baghy.

kiranton ŝi amis de jaroj kaj ĉi tiu ambicia aventuristo estis ŝia kompaniano en iliaj komunaj grandaj projektoj.

Se vi nepre volas, mi povas rakonti ke mem sinjoro Riom persvadis la vicomtesse'on, ke ŝi aspiru la postenon de la reĝa amatino, ĉar ĉi tio malfermis fendon ankaŭ por li al la kortegaj intrigoj...

Kompreneble ke tiam, kiam Madame d'Artigny koketis al la markizo, la kavaliro devis ŝajne venkigi sin de la poeto. Animi li devis lin per io...

Sinjoro Saint Aubin hontante konfesis al la vicomtesse, ke li tre volus ke kavaliro Riom ludu la rolon de Arlequin. Kun certa infana timemo li flustris al ŝi ke li estus feliĉa, se ankaŭ la kortego vidus lian triumfon.

La koketa vicomtesse ekridegis kaj kun preta ĝojo ŝi konsentis. Ŝi promesis ke ŝi mem persvados la kavaliro...

\*

Ĉu estis pli feliĉa homo en la mondo, ol la markizo, kiam komenciĝis la provoj? El kio la vicomtesse ankoraŭ ĉiam menion volis doni al li, abunde li elprenis el tio sian parton dum la provoj. Ĉar ja, eĉ se nur sceneje, sed li povis brakumi, kisi sian idolon!...

Konsiderante ja ĉi tion jam antaŭe li verkis tiel la teatraĵon, ke Pierrot povu kiel eble plej multe kisi Colombine'on kaj la paŝtistino kiom eble plej multe da plej amaj konfesoĵ faru al li!

Li mem estis la reĝisoro kaj ĉiam li trovis ke Colombine neniam deklamas sufiĉe arde siajn korelverŝojn kaj ĉefe sian fideljuron ŝi ne diras kun sufiĉe konvinka entuziasmo.

Li senfine ripetigis siajn amajn scenojn kaj ĉiam antaŭ la cinike ridetanta Riom... Eĉ se li triumfis je li, kvazaŭ sentante sian pereon — de tago al tago pli kaj pli li malamis lin denove.

La rolon de Arlequin li neniam trovis sufiĉe repuŝa kaj okaze li ĉiam alskribis ian abomenan trajton. Estu do nur tiom pli granda je la fino la triumfo de Amo je Intrigo.

Li konstante turmentis per sia jaluzo la vicomtesse'on. La koketa virino nur ridis kaj silentigis lin kvazaŭ infanon, sed poste ŝi enuis la aferon. Tiom pli, ĉar aliflanke ankaŭ la kavaliro komencis rigardi per kurbaj okuloj sian brakumadon kun la markizo.

Fine oni anoncis la komedion al la reĝo kaj lia reĝa moŝto mem fiksis la tagon de l'prezentado. Nur tion ĉi atendis Madame d'Artigny. Nun jam estis preta la teatraĵo, la rolo, ŝi jam finlernis ĝin, — ŝi jam ne plu bezonis la ridinde sentimentalan poeton, kies korelverŝojn ĝis nun por la intereso de l'afero pacience ŝi devis toleri. De tago al alia ŝanĝis konduton la sprita vicomtesse.

Kaj tiam, anstataŭ la ĝisnumaj feliĉaj horoj pezaj provoj falis sur la kompatindan markizon. Li, amanto de arbara soleco, amiko de floroj, nenion komprenis el tiu intrigo, sed lia koro krevis pro ĝi. Li nur vidis ke lia idolo kaj disciplino nun subite neglekte kaj enue muelas tiujn amajn partojn, kiujn li tiel karese instruis al ŝi kaj ke kontraŭe Colombine akceptas multe pli cedeme la delogajn vortojn de Arlequin, ol tio estis skribita en la teksto.

Vane li citis la tekston, lia Colombine ne plu zorgis pri li, sed tie, kie ŝi estus devinta repuŝi Arlequin'on, tiel volupte kisis la deloganton, kiel lin, Pierret'on ŝi estus devinta kisi... Li rimarkis ke alia vento vekigis en la aprila koro de l'vicomtesse, ke ne lin ŝi amas plu, sed tiun rivalon, pri kiu li kredis ke por ĉiam li venkis lin.

— Bergeronette, — flustris la markizo, — ĉu vi do ne plu amas min?

Madame d'Artigny ridegis en liajn okulojn... Kaj de tiam granda ĉagreno ekloĝis en la animo de sinjoro Saint Aubin. Nenion plu li parolis, li ne tedis Colombine'on per sia jaluzo, li nur malgrasigis kaj konsumigis de tago al tago. Li jam apenaŭ havis forton por ludi...

Larmoj ŝteligis en liajn okulojn, kiam kun soifa ĉagreno li flustris la konfesion de Pierrot kaj foje li laŭte ekploregis, kiam li aŭdis la mensogan fideljuron de Colombine.

Du tagojn antaŭ la prezentado li malsaniĝis kaj li anoncis al Madame de Pompadour, ke li ne povos ludi.

En la lito lin atingis la denove mensoge sentimentala letero de la vicomtesse, en kiu la paŝtistino petis lin pro ĉiuj sanktuloj ke, eĉ se duonmortinte, sed li ludu, „ĉar la reĝo certe ĉeestos“...

Kompatinda amanto! Ankoraŭ laste li lasis sin trompi kaj li kredis ke la vicomtesse eble tamen nur lin amas kaj tial ŝi vokas lin tiom, ke en la rolo de Colombine ŝi povu konfesi al li veran amon...

\*

La plej brila festo de l'printempo estis tiu trianona posttagmezo... En iu arkadia angulo de la parko estis la scenejo kaj sur la rigardejo ĉirkaŭ la velurŝego de l'rego ĉeestis la tuta Versailles.

Lia reĝa moŝto rigardis la teatraĵon kun eksterordinara bonvolo; eble nur mem la personon de l'vicomtesse li detalis kun pli granda bonvolo... Sed li miris ke sinjoro Saint Aubin, kontraŭ sia promeso, verkis denove komedion.

La roluloj estis eminentaj. Colombine-Bergère aspektis

## MOESTA ET ERRABUNDA

CLARLES BAUDELAIRE

*Ho diru, ĉu la koro ne tiras for, Agata,  
El la nigranta maro de l'urb' malpura vin'  
Al mar' alia, blua, de brilo radiata,  
Profunda, klara, kiel la ĉasto de virgin',  
Ho diru, ĉu la kor' vin ne tiras for, Agata?*

*La mar' la vasta mar' nin konsolu en ĉagren'!  
Kiu demono donis al raŭka kantisto  
Akompanata de la muĝanta vent-orgen'  
Ĉi delikatan povon de milda vartistino?  
La mar', la vasta mar' nin konsolu en ĉagren'!*

*Ho portu min, vagono! Flugigu, vel' fregata!  
For, for! Ĉi tie estas la kot' el nia plor'!  
Ĉu ne? Vin ofte urĝas la larma kor', Agata:  
For, for de animmordoj, de krimoj', de dolor'  
Ho portu min, vagono! Flugigu, vel' fregata!*

*Parfuma paradizo! Ho kiel fore jam!  
En kiu, sub lazuro, nur am' kaj ĝoj' sin donas,  
Kaj inda estas ĉio amata je la am'  
Kaj en volupto pura la koro tie dronas.  
Parfuma paradizo! Ho kiel fore jam!*

*La verda paradizo de amoj knabnaivaj,  
Pelludoj, kantoj, kisoj, bukedoj, kompliment',  
La vibraj violonoj post montoj mol-deklivaj,  
Kun kruĉ' da vin' en bosko, tra la vespersilent',  
La verda paradizo de amoj knabnaivaj.*

*La paradiz' senkulpa, pasema idil'  
Ĉu ne pli malproksimas, ol hinda, ĉina tero?  
Ĉu povas ni revoki ĝin per plendanta kri',  
Ĉu povas voĉ' arĝenta ĝin veki por apero?  
Ho, paradiz' senkulpa, pasema idil'!*

El la franca: K. de Kalocsay.

belege, bonega estis Arlequin, kiel malica deloganto, sed en la sceneja efekto neniu el ili povis konkuri kun Pierrot. La markizo ludis kun lia maltrankviliga, febra ekstazo... Liaj amikoj, kiuj jus antaŭe vidis lin duonmortinta, ekmiris pro lia subita transformiĝo.

Tion vere neniu sciis, eĉ ne la surprizitaj geamantoj, kion vidis la poeto tuj antaŭ la komenco de l'prezentado post la dekoracioj. Li surprizis la vicomtesse-on kaj la kavaliron en freneza brakumo kaj nun li jam sciis ke la idolo de sia koro vere ne amas lin, sed lian rivalon...

Kvazaŭ fulmo frapis tiu ĉi scio la velkintan, malsanan homon, sed en la sekvinta momento, jam donis al li ian fatalan forton certa penso... Li volis ludi denove kun Colombine. Kaj la kompatinda Pierrot ludis kortuŝe ĉagrene, kun tiel minaca bonhumoro, ke la publiko atentis liajn vortojn kun tremanta plezuro.

En lia unua granda sceno kun Colombine estis tiom arde avida malespero, ke lia reĝa moŝto kapbalancis ĝustige kvar kaj duonon da fojoj kaj levis la manojn por aplaŭdo. Nur tiam troigis iom la markizo, kiam la konfeson de Colombine li devis aŭskulti; per preskaŭ malamanta ardo li premis al si sian amatinon. Kaj la scenon de juro li efektive fuŝis, — li mem ĵuris sian eternan fidelecon per ia fatala seriozo, sed je la aŭdo de la juro da l'vicomtesse subite li nekomprenoble ekridegis...

Sekvis la scenoj de Arlequin; kiam la koketa Colombine kun certa nemotivita ardo toleris la brakumon de l'deloganto, subite vidis la publiko, ke Pierrot sinforgese miras ilin kaj forgesas sian direndon... Nu, sed ĉi tio estas sensignifa bagatelo. Kun konstante kreskanta efiko daŭris la teatraĵo.

... Ni estis ĉe la lasta sceno. La trompiĝinta Pierrot falis sub la arbo kaj kun tia malespero li deklamis sian ĉagrenon, ke preskaŭ konfuza movo estis rimarkebla en la vicoj de la sinjora societo. Tiun parton, en kiu li diras ke li tamen kredas je sia amatino kaj nur lastan provon li volas fari pri ŝi, la markizo ludis iom pli neglekte...

Aperis Amoro kaj anoncis al Pierrot ke Colombine, lin serĉanta, jam trovis liajn postsignojn kaj ŝi estos ĉi tie. Pierrot rigardis posten kaj vere li ekvidis sian amatinon.

Nun alvenis la momento de la ŝajna sinmortigo. Li eltiris sian ponardon. La publiko ankoraŭ miris kaj laŭdis la luksecon de la scenejaj aĵoj, ke la markizo ne venis kun ordinara, farbita lignopikilo, sed kun vera ponardo. Kaj kun tiel natura movo li pikis ĝin en sian bruston, ke la rigardanto vere ne povis kompreni, kien li povis glitigi la pinton de l'ponardo, kun tiom da reala arto li paliĝis kaj baraktis sur la tero ke mem ankaŭ la reĝo ektemis kaj laŭdis lin per laŭta *bravo!*...

Colombine elpaŝis iom enue. Lace ŝi deklamis la ĉagrenojn da l'paŝtistino serĉanta sian amaton. Ŝajnis ke jam antaŭe ŝi abomenas tiujn kisojn, per kiuj ŝi devos revivigi Pierrot-on. Fine ŝi paŝis al la ŝajne sinmortiginta paŝtisto, kiu ankaŭ plu bonege ludis sian rolon. Ŝi kliniĝis apud li, por ĉirkaŭpreni lian kolon... Sed tiam terura vekrio ŝiriĝis el inter la lipoj de Colombine.

La reĝo kaj la kortego ĉirkaŭstaris ŝtoniĝinte pro la teruro Pierrot-on, baraktantan en sia sango. La markizo mortante levigis iom. Malforta rideto konvulsiis ĉirkaŭ liaj lipoj, kiam li suprenrigardis al la reĝo:

— Sire, pardonu min, ke... tiel... lasta-momente... mi ŝanĝis en mia teatraĵo... Malbona estis la... fino, Colombine tamen estos pli feliĉa... kun Arlequin... Pierrot povas iri... Sire, bonan nokton...

Lia reĝa moŝto plej bonvole honoris la subulan fidelon de Monsieur de Saint Aubin.

— Jen, sinjoroj, — li diris kun solena voĉo, — la sinjoro markizo certe troigis sian subulan fidelon, sed tamen laŭdinde, ke, eĉ se je la kosto de sia vivo, li plenumis la promeson faritan al sia reĝo kaj por la surprizo de ni ĉiuj, li improvizis tragedion el sia komedio...

El la hungara: *Karlo Bodó*

## PAPERSAKETO DA SUKERAĴOJ

HASSE ZETTERSTRÖM

Jus min enlitiginte mi ekvolis estingi la lumon; tiam mi aŭdis, ke knaras la ŝtuparo de la supera etaĝo. Tuj oni frapis je la pordo kaj mi vokis: eniru.

Sur la sojlo ekstaris Emanuel en sia longa blanka noktoĉemizo.

— Kion vi deziras? mi diris.

— Kuŝante mi pensis pri afero, kiun mi volus demandi.

Emanuel aspektis tre serioza. Li apogis sin kontraŭ la pordfosto kaj diris kun malrapida kaj iom solena voĉo:

— Se knabo vizitas kun knabino teatron aŭ kinematografeton, kaj li havas papersaketon da sukeraĵoj, ĉu li do devas donaci al ŝi la tutan saketon aŭ ĉu li nur petu ŝin preni el ĝi? Astrid diras, ke li ne estas korekta, se li ne donacos al ŝi la tutan saketon.

Mi ridetis pensante: Jen ni estas tie. Deksepjara, kaj jen komencas... la devoj de la *gentleman*. La momento venis, tiu momento en la vivo de viro, kiam li perdas sin mem fariĝante la servanto kaj sklavo de virino.

Mi diris:

— Vi plejvole preferas domi al ŝi po unu peceton, kio estas ja la plej ĝusta; sed komprenoble ke vi donu al ŝi la tutan saketon. Vi nepre devas fari tion kaj devas ankaŭ ĝoji, ke nur estis saketo da sukeraĵoj.

Ekfrapis min penso kaj mi diris ankoraŭ:

— Ĉu vi demandis vian patrinon pri la afero?

— Jes, diris Emanuel kaj rigardis rekte en la aeron, — ŝi diras, ke mi devas donaci al ŝi la tutan saketon kaj ke iam

mi vokos la sukeraĵistan bubon por aĉeti ankoraŭ unu saketon kaj poste ekmalaperi en la kafejon, lasante ŝin sola kun la sukeraĵo dum la tuta interakto.

Fariĝis silento, kaj je tio mi diris:

— Komprenoble ke via patrino estas prava. Ŝi estas ĉiam prava, ĉar ŝi estas virino — tiel kiel Astrid.

Ni rigardis unu la alian kaj en tiu rigardo enestis ĉia tiu bona kaj bela interkompreno, kiu ekzistas inter ĉiuj viroj de la mondo de post nememoreblaj pratempoj.

— Bonan nokton do, diris Emanuel, kaj tiel malaperis tra la pordaperturo liaj longaj mallarĝaj piedoj.

Mi estingis la lumon kaj pretigis min por dormi; tiam oni frapis mane sur la maldika tabulmuro kaj mi aŭdis la penetran knabinvoĉon de Anna-Klara:

— Mi aŭdis ĉion kion vi diris! Kial tiu Astrid havu tutan saketon da sukeraĵoj, dum mi ricevas nur tiom malgrandan peceton?

La vivo estas plena de strangaj demandoj. Oni plej prospere trapasos se oni ne povas respondi la plej komplikajn kaj pro tio mi kridiris returne:

— Knabino tiel malgranda, kiel vi, devas dormi je ĉi tiu malfrua horo de la nokto. Jen silentu.

Kaj tiel iĝis silento.

Sed kiam Anna-Klara estos iam dekseksjarulino, ŝi ricevos tre certe tutan papersaketon da sukeraĵoj kaj neniel nur malgrandan peceton. Sed tiun saketon ne donacos al ŝi Emanuel.

El la sveda: *Paul Nylén*

# LA VUNDA PUNKTO

RAYMOND SCHWARTZ

Sur la bulvaroj oni vidis nur fremdulojn, ĉar dum somero Parizo fariĝas kosmopolita kolonio. Des pli feliĉa mi estis kiam subite mi rimarkis konatan vizaĝon!

La bonvena posedanto de tiu jam ne plu juna vizaĝo neniam apartenis al la rondo de miaj amikoj intimaj, nur malofte kaj nur tre supraĵe mi estis rilatinta kun li, sed hodiaŭ li tamen aspektis alloga kiel floranta oazo en nuda dezerto.

Kun ĝoja ekkrio mi tuj salutis lin kaj dank' al prava inspiro mi tuj alvokis lin en Esperanto, — prava inspiro pro du kaŭzoj: Unue, ĉar — kiel jam enire mi aludis — oni ŝajnus fenomeno ekzemplero de antaŭdiluva speco se dum junio de Ekspozicia Jaro oni parolus france sur la Parizaj bulvaroj, kaj due, ĉar mia maljuna kunulo parolas sufiĉe bone Esperanton, kvankam li estas Lingva-Komitano.

Mia ĝojo estis tiom sincera kaj la vetero tiom varma, ke mi tuj trenis mian viktimon al la teraso de gastema drinkejo.

„Vi faros al mi la plezuron akcepti glason da freŝa biero, ĉu ne?“ — sed konsciante, ke mi sidas apud „samideano“ mi tuj prudente aldonis: „Eble vi estas kontraŭalkoholisto kaj preferos glason da citronakvo?“

„Tute ne, mia kara, — mi tre volonte trinkos bieron.“  
„Ah?“ mi diris, mire kaj larĝe malfermante la buŝon, — „vi trinkas alkoholon? — Sendube vi do estas kontraŭtaba...“ — Mi ne bezonis finparoli, ĉar sammomente li elpoŝigis pipon kies respektinda brulujo nekontraŭdireble respondis al mia embria demando. — Re-„ah“inte mi daŭrigis:

„Vi fumas? — Eĉ tabakon vi fumas? Mi do necese konkludas, ke vi estas vegetarano!“

„Vegetarano? — La bifteko kiun mi tagmanĝe malaperigis ne samopinias!“

„Diablo!“ mi pensis mallaŭte kaj pli laŭte mi diris: „Pardonu mian nediskretan trudemon, sed verŝajne vi estas ĉastemulo!“

Responde li nur ridetis kun ruza signifo kaj parolis: „Ĉastemulo? — Kio estas tio?“

Se mi ne timus ankoraŭ pli difekti mian bedaŭrinde

jam tre kadukan reputacion, mi raportus laŭvorte la tekston de mia klarigo, sed estas preferinde noti nur lian respon-  
don:

„Nu, nu“, li jesis, „mi komprenas, sed, en tiu kazo, via insida demando estas tute superflua, aŭ ĉu vi forgesas junulo, ke mi naskiĝis en 1843? — Ah, dum miaj junaj jaroj...“ kaj li reveme blovis grizbluan fumrington en la aeron... kiel oni legas en romanoj.

Por mi la problemoj fariĝis ĉiam pli komplika kaj intriga. Jen eksterordinara tipo! Mi cerbumis por ek trovi lian vundan punkton:

„Strange“, mi konfesis, „vi estas Esperantisto kaj tamen vi estas vestita kiel normale civilizita Eŭropano, vi eĉ surportas ĉapelon! — La steleto en via butontruo ne havas kriantan dimension kaj ne estas pli ampleksa ol bone nutrita cimo, — ĝis nun vi ne ankoraŭ parolis pri lingvaj plibonigoj nek pri internacia organizado...“

„Estas vere“, li interrompis, „ke vi ne lasis al mi la tempon, — tamen, tio ne estis mia intenco!“

Mi daŭrigis mian enketon: „Ĉu vi iam rimis? ian fondis novan gazeton?“

„Neniam, nek... kabareton!“ li aldonis malice.

„Bone!“ mi venkocerte ektriumfis post granda streĉo de la cerbaj ĉeloj, „nun mi divenas: Vi kolektas poŝmarkojn bildflanke!“

„Vi maltrafis! Neniam mi korespondis krom okaze de vere urĝaj aŭ seriozaj aferoj!“

„Nu“, mi petegis venkite, „ĉu do vi estas perfektulo?“

„Nur normala homo, mi modeste opinias“, kaj tion dirinte li fintrinkis sian glason. — Intertempe mi pagis al la kelnero kaj mi reenpoŝigis mian monujon kiam, kvazaŭ haltige, li tuŝis mian brakon:

„Imagu, juna amiko, kio okazas al mi! Jus mi rimarkas, ke mi forgesis hejme mian monujon, kaj mi eliris speciale por aĉeti dentobroson al mia edzino. — Ĉu vi eble povus pruntedoneti al mi kvin frankojn? nur ĝis morgaŭ, kompreneble...“

Ankoraŭ hodiaŭ mi ploras pri la malfeliĉa sorto de miaj kvin frankoj.

## ARTO KAJ ARTISTOJ

PAULO VARSÁNYI: LADISLAO DE PAÁL.

L. de Paál (1846—1879), vivis sian infanaĝon en Transilvanio, en la plej bela regiono de la iama Granda Hungarujo. La Naturo frue katenis lian atenton kaj ankaŭ lian koron: 17-jara, li jam bone konis la kaŝitajn belajojn de sia hejma tero, kaj la skizoj pri ili, en lia ĉiam kunportita skizkajero, estas veraj amkonfesoj de burĝonanta animo al la granda Naturo.

Li malkaŝas sian deziron: fariĝi pentristo. La patro malkonsentas, li preferas la ŝtatan oficon trankvilan al la malcerta artista vivo, por sia filo. Paál ŝajne rezignas, vojaĝas al Vieno por aŭskulti juron, sed — vizitas la artan akademion.

Diligente li desegnis tie en la tre detalema skolo de majstro Zimmermann, kiu tuj rekonis lian grandan talenton kaj kiu sukcesis trankviligi ankaŭ la konsterniĝintan patron.

Sed la bagatelema desegnado tute ne konvenis al la temperamento de Paál. Same ne kontentigis lin kun sia akademiisma, artifikita, efektamasiga, spekulative emociiga direkto, la Düsseldorfa skolo, kie li poste kune studis kun Miĥaelo Munkácsy.

Li estis tre ardema, subjektiva, forte impulsiva indi-

viduo, kiu klopodis je la senpereco de l' esprimo, kiu inspiris la granda unueco de la Naturo, kaj kiu, per larĝaj, fortaj peniktiloj volis respeguli sian internan mondon.

Multe pli influis lin liaj vojaĝoj. En Nederlando la vapora aero de la lando de Rembrandt montris al li novajn atmosferajn efektojn, kiujn li, en Londono, admire rekonis sur la bildoj de la anglaj lumpentristoj Turner kaj ĉefe Constable.

Revenante al Düsseldorf, li komencis tre diligentan laboradon, kaj, je la moko de la adeptoj de l' komponicio, ĉiam en la libera aero. Moko akraj kaj laŭdoj grandaj, sukcesoj kaj malsukcesoj alternis tiam en lia vivo kaj maltrankviligis lin krome ankaŭ familiaj malfeliĉoj. Preskaŭ en malespero li ricevas la inviton de Munkácsy — al Parizo. Li hezitas. Fine li cedas al la voko de la fidela amiko.

La vigla artista vivo de Parizo, la bildoj de Corot, Millet, Rousseau, Troyon, Daubigny ktp. estas por li kvazaŭ revelacio. Lian revenintan memfidon plifirmigas la sukceso de la „Arbara Vojo“ (Viena mondespoz. 1873.). Kun granda laboremo, li vojaĝas, kune kun Munkácsy, al Barbizon, en la arbaron de Fontainebleau, naskotero de multaj senmortaj kreaĵoj. El la grandaj maljunuloj ankoraŭ

vivas, siajn lastajn tagojn, Millet. Sed junuloj, inter ili ankaŭ konatoj de Paál, diligente laboras en amika kolonio. Li plektas belajn revojn. Sed ilin baldaŭ diŝiras la sorto.

Lia familio hejme falas en la plej grandan mizeron. Mortas lia patrino, poste ŝin sekvas ankaŭ lia patro, inter mizeraj cirkonstancoj, kaj li ne povis helpi ilin, nek liajn fratojn, kies sorto peze premas lian koron. Pli kaj pli li malbeliĝas. Zorgoj turmentas la eluzitajn nervojn, kiuj jam portas en si mortigan venenon. Li fermiĝas en si. El la sunbrilaj maldensejoj, li vagas pli kaj pli profunden, en densaĵojn, senhomvoĉan silenton, al solecaj platanoj, kverkoj, salikoj — kunuloj liaj en malgajeco.

Kaj la bildoj de ĉi tiu periodo akre diferencas de la pentraĵoj de ceteraj Barbizonaj pentristoj, en ĉi tiuj pejzaĝbildoj pli kaj pli montras sin la *subjekto de la artisto* — ĉi tiuj pejzaĝbildoj esprimas sorton *homan*, la sorton de la artisto. El liaj malhelaj, obtuziĝintaj kolorgamoj parolas

esperperdita estaĵo, kiu kune ĝemas kun la vespera venteto kaj kune ploras kun la aŭtuna velko.

El la letargio por mallonge lin vekis la sukceso de la „Marĉo de ranoj en la Fontainebleau arbaro“ (Salono 1876.). Samtempe kreiĝis la „Pariza vojo en la Fontainebleau arbaro“. Sed nenium el ili li povis forvendi; li refalis en apation. Lia mizero iĝis ferura. Munkácsy tiam loĝis jam en luksa palaco. Verŝajne lia sinretena naturo malhelpis al Paál plendi, ĉar Munkácsy, ĝismorte fidela amiko, certe lin estus helpinta.

Nenian esperon de valorigo li vidis plu, lace sin trenis tra mallargaj arbarvojoj. Kaj, en 1877, lin trafis fatala akcidento, li vundiĝis sur sia kapo. La vundo saniĝis, sed cerbdoloroj lin turmentis senĉese, kiuj muelis al li eĉ la restaĵojn de lia animforto. Febra laboro lin elĉerpis ankaŭ korpe, tiel, ke liaj amikoj devis lin porti en sanatorion. Tie li mortis je la 3-a de marto 1879.

## O B S E R V O

JULIO PEKÁR,



juristo, eksministro (nask. 1867), estas unu el la pleje konataj hungaraj veran la lando. Li koniĝis unue sian nomon per novelserio humora: „La problemoj de ĉefleŭtenanto Dodo“. Longe li vojaĝis eksterlande kaj longe restadis en Parizo, en artaj kaj kulturhistoriaj studoj, kies rezulto estas multaj beletristikaĵoj kaj alispecaj verkoj. De kelka tempo li aktive partoprenas en la politika vivo, sed tio ne faras malpli fekunda lian beletristan plumon. Noveletoj, romanoj, dramoj, plej parte moderntemaj, estas liaj verkoj, sed volonte li reiras ankaŭ en lia estinton, precipe en la francan Rokoko-mondon, en la hungaran historion de la XVII. kaj XVIII. jarcentoj, kaj en la hungaran Biedermeyer-epokon. Fundamente li estas romantikisto, li preferas la mistikajn mirindajn komplikajn historiojn, sed nune aperas en lia poezio iom da sana realismo, hungaraj koloroj kaj spirito kaj ankaŭ serena humoro. Pluraj liaj verkoj estas premiaĵoj de la hungara sc. akademiio, kies korespondanta membro li estas. Réki.

XVIII. jarcentoj, kaj en la hungaran Biedermeyer-epokon. Fundamente li estas romantikisto, li preferas la mistikajn mirindajn komplikajn historiojn, sed nune aperas en lia poezio iom da sana realismo, hungaraj koloroj kaj spirito kaj ankaŭ serena humoro. Pluraj liaj verkoj estas premiaĵoj de la hungara sc. akademiio, kies korespondanta membro li estas.

### „LA SUISTO DE MESSINA“

satira historia dramo de *Alessandro de Stefani*, estos la ĉi-jara unua novaĵo de pluraj scenejoj. Antaŭ apenaŭ duonjaro estis la premiero de ĉi tiu stranga-gusta dramo en Romo, kie la teatro de *Pirandello*, la „Teatro d'Arte“, kun ĝi malfermis pordegon. Ĉe la Roma unua prezentado ĝi havis sinceran, grandan sukceson. La kritiko kaj la publiko akceptis ĝin kun la sama granda entuziasmo. Sed post la unuaj prezentadoj *Pirandello* vokis al si de *Stefani* por pli longa pritrakto, kies rezulto estis la jena konsilo:

— Kara amiko, vi devos imiti la metion de la heroo de via teatraĵo. Ankaŭ vi devos *Itiki*. Mi ne deziras ke ŝuojn vi fliki, sed vi fliki — *vian dramon*. Verku prologon antaŭ ĝin, kiu enhavos la tonon de la tuta teatraĵo, la varmegan, amaran aeron, kaj kiu donu tute italan karakteron al la dramo kaj tiam... venontjare ni reprenos la „ŝuiston de Messina“.

*Alessandro* de *Stefani* obeis lin. Dum la somero li verkis la prologon kiu tute kontentigis *Pirandello* kaj li ankoraŭ ĉi-aŭtune, en la nova formo, prezentos denove la grandsukcesan malferman teatraĵon.

La internacia publiko ankoraŭ ne konas *Alessandro*'n de *Stefani*, kiu elluktis por si eminentan nomon per kelkaj majstraj verkoj (*Malati di Passione*, *I giardini di Armida*, ktp.) en la nova itala literaturo. Krome li ŝatas la historiajn temojn kaj la historian aeron, sed li ne ellaboras sian temon kun la ekzaktemo de historiisto, sed ĉiam donas al ĝi poezian fonon. Tiel li

verkis laŭ malnova kroniko ankaŭ „La ŝuiston de Messina“, kiu ja estas historia dramo, sed en ĝi la historio estas nur fono, apud kiu supergravas simbolismo, fantasteco, mistikismo.

Sed krom ili la teatraĵo enhavas ankaŭ fortan dramagan agadon.

En suda Italio, lando de l'pasiaj karakteroj, vivas la fanatikulo de l'Vero kaj Justeco, majstro *Andreo*, ŝuisto de Messina, kiu sidante sur sia tripieda seĝo, ne kontentas fliki nur ŝuojn, sed, en la silento de sia eta laborejo, rompas al si la kapon pri la flikado de la tera justodono. La princereganto ĉiam denove pekas kontraŭ la justeco, ne ĉiam punas, eĉ li mem faras ofte kulpojn, rompante la leĝojn, Majstro *Andreo* ne povas toleri ĉi tion. Li mem transprenas la senindulgan rolon de l'justofaro kaj en sia laborejo li mem sola fariĝas akuzisto, pledisto, juĝisto, eĉ ekzekutisto. Por kulpinto plu ne la juĝo de l' profesiaj juĝistoj, sed tiu de l'malserena, vortavara ŝuisto fariĝas fatala. Kaj tiun juĝon li ankaŭ plenumas; tagon post tagon okazas, en la noktaj silentoj, misteraj murdoj, sed la murdinto neniam estas elesplorebla. En konstanta teruro vivas la tuta urbo, kaj majstro *Andreo* memkontente konstatas, ke li perfektigas la justodonon. Nur unufoje li ekŝanceliĝas en sia senindulgo: ankaŭ mem la princereganto adultas, kaj, eĉ se lia kulpo ne venas antaŭ juĝistaron, la ŝuisto eksciigas ĝin kaj kondamnas lin senindulge — sed la juĝon li ne plenumas, uzante sian plej ĉefan rajton de pardono. Li pardonas sian propran reganton. Sed kontraŭ aliaj li ne tiom estas indulgema. Guste pro tio, la princo, kiam oni trovas sian plej fidelan kortanon mortigita sur la strato, fiksas 1000 orojn je la kapo de la nekonata murdinto.

La ŝuisto estas tre malriĉa. Kun li vivas en mizero lia fratino, gvidanta lian mastrumadon. La knabinon amindumas kun amo je morto iu junulo en la urbo, ankaŭ mem malriĉa, ne povanta sin helpi. Malesperiginte, li iras al la princo, akuzante sin mem pri la murdoj. Sed la ŝuisto, fanatikulo de la Vero, eksciinte ĉi tion, rapidas al la princo. En granda sceno, ekscitiginte li jetas al la princo, ke li devis fari juston, ĉar en la urbo ekzistas nur falsistoj de justo. Li konfesas, ke li mem estas la vera murdinto. Kiun la ŝuisto foje kondamnis, sed poste pardonis, la princo nun uzas la rajton de pardono por la ŝuisto kaj sendas lin hejmen kun la rekompenco de mil oro. Sed antaŭe li pravas al la ŝuisto, ke la murditoj ne estis kulpaj pri tio, pro kio ili estis mortkondamnitaj de la ŝuisto.

Ĉi tio konsternas kaj taŭzas la animon de nia ŝuisto. Li rekonas ke ĝis nun li ne estis juĝisto, sed murdisto ordinara.

Kaj nokte vere aperas antaŭ li la spiritoj de liaj murditoj. Kaj sub la terura voĉo de la konscienco majstro *Andreo* tranĉas sian gorĝon per la ŝuista pikilo kaj per tio li faras sian novan, nun jam lastan murdon.

Majstra kunfando de la fantastaĵoj, misteroj, poezio kaj realo estas ĉi tiu dramo, kiun el malnova kroniko ĉerpis *Alessandro* de *Stefani*. La teatro de *Pirandello* prezentis la profundsencan teatraĵon en grandioza kunludo, el kiu leviĝas, eĉ, la ludo de *Lamberto Picasso*, la neforgesebla prezentanto de la ŝuisto de Messina.

—u. —e.

(Daŭrigo de la dua paĝo)

serĉo. La „oriento“ estas nur kadro, kiu ebligas fabelmaniere ornamu la veron de ĉiu mondparto. La grandtalenta verkisto antaŭ ni tenas spegulon kaj rekonante niajn absurdajn tamen ni ne povas koleri. Ni ridas kaj ridas eĉ pri ni mem. La rido estas ekora kaj ni kaptese konstatas, ke tiu-ĉi rusa verkisto delikate ruze tuŝas la malfortan flankon kaj mirinde ne doloron sed tikhon kaŭzas. La brila interpretado multon helpas en la sukceso. N. Hohlov montras sin ne nur lerta, sed perfekta en la tradukarto. Lia eleganta stilo garantias artan ĝuon por la leganto kaj mi rekomendas al ĉiu la aĉeton de la verko, ĉar krom la plezuro oni ekkonas, kiel devas aspekti la „imitinda stilo.“

HENRYK SIENKIEWICZ: NOVELOJ

El la pola. trad. Lidja Zamenhof. 64. pag.

Jam estas bone konata antaŭ la E-ista publiko la nomo de *Sienkiewicz*, ĉar kelkaj el liaj verkoj aperis en bonaj tradukoj de niaj eminentuloj. *Lidja Zamenhof* aliĝis al tiuj per sia distinginda kaj rimarkinda traduko. Sia arta gusto bone elektis, ŝia lingva lerteco sukcese interpretis. La noveloj estas ĉarmaj, kortuŝas kaj akcelas la formadon de pli kompleta bildo pri la mondfama verkisto. Ne estus mirinde, se la unua eldono baldaŭ elĉerpigus, ĉar la verketo meritas la atenton de ĉiu literaturamanto. Mem la firmo eldonanta konsciis pri tio kaj uzis pli bonkvalitan paperon por akiri plenan kontentecon ĉe la leganto.

LA URBESTRO DE ZALAMEA.

Dramo en tri aktoj. El la hispana originalo: Enrique Legrand. Montevideo. Eldono de la tradukinto 1925.

La dramo estas strange viva ankaŭ por ni. Ne estas plu aktuala ĝia tendenco, ne estas moderna la dramista konstruo, tamen, trans aktualeco kaj modo, ĝi enhavas moralajn instruojn ĉiam validajn kaj artismajn valorojn same ne velkemajn, kiel tiuj de Shakespeare.

La temo de la dramo, ke urbestro, per la risko de sia vivo punas oficiron, kiu perfortis lian filinon, ne estas tro komplika kaj ankaŭ la lingvovido estas simpla, travidebla. Sed tre fortefikaj scenoj, trafaj diroj, spritaj ekpensoj, poeziaj kaj tre dramaj paroloj, eble iom tro retoraj, sed bele konstruitaj, brilantaj monologoj abundas en la verko, kiu ofte havas la kapablon — kultureni la leganton nerezisteble.

Certe la stilo, la lingvaĵo de la verko estas unu el la ĉefaj belaj de la originalo, do la tradukinto surpris ne facilan taskon.

Sed en la solvo de ĉi tiu malfacila tasko li surprize eminentis. Eble li pli sukcesis en la spritaj kaj refleksiaj partoj, ol en la sentimentaj, sed la plej ĝojiga afero estas por la leganto, ke li dum la lego, malgraŭ la versa formo, ĉiam, aŭ preskaŭ ĉiam povas senti tiun bonan Esperantan guston sur la langvo.

Vere elegantaj, agrable fluaĵ estas ĉi tiuj versoj. Krome ni rimarku, ke la versoj sekvas la Zamenhofajn ritmoregulojn, do, kvankam romanlingvano, li ne uzas tiujn deflankigon, kiujn ni trovas ĉe kelkaj romanlingvaj Esp. poetoj.

Sed ni ne povas preterlasi kelkajn rimarkojn prilingvajn.

La tradukinto ofte uzas erare konjunktivon anstataŭ indikativo aŭ kondicionalo. Ekz. li timas ke oni povu imagi. (Ĝuste: *povos*, aŭ *povus*). Alia: Ne bedaŭru, ke ni lasu... (ĝuste: ke ni *lasas*). En Esperanto nenia regulo ekzistas por la uzo de konjunktivo, do oni ĝin devas uzi nur laŭ la postuloj de la senco.

Alia afero estas la loko de la *ne*. Mi ne vin serĉas — ĉi tio signifas: ne vin, sed iun alian, do mi neas la vorton *vin*. Mi ne serĉas vin — ĉi tio signifas: mi povas havi ion por fari kun vi, sed tio ne estas serĉo, (la frazo ja estas daŭrigebla: ... sed evitas.) Lastokaze do mi neas la vorton *serĉas*. Ĝenerala regulo: „Ne“ staras ĉiam antaŭ la neata vorto.

Estas ankoraŭ kelkaj makuletoj, sed tiujn rimarkas nur tiu kiu pasie ĉasas ilin.

Entute la libro, grava pliriĉigo! estas urĝe mendinda!

ADA: REMEMOROJ DE ESPERANTISTO.

Eldono de Dimitr Tuĝarov. Tatar-Pazarĝik. Bulgarujo. 85 pĝ. Prezo 1 svfr.

De longe mi deziras legi romanon el la esperantista vivo. Vere nia movado havas sufiĉajn tipojn, kaj ankaŭ sufiĉajn okazaĵojn por esti fundamento, aŭ almenaŭ fono de romano. Komprenoble mi imagas romanon vere esperantistan, ne tian, en kiu Esperanto estas entrenata kvazaŭ je oreloj, kaj ĝia tuta funkcio estas, ke — ĝi ĉeestas tie.

Tian deziran romanon mi ne legis ankoraŭ, sed jen estas io plej proksima al mia deziraĵo: aŭtobiografio de Esperantisto. En ĉi tiu libro vere homaj sortoj sin turnas ĉirkaŭ Esperanto,

kaj por esperantisto, kiu konas la sialandan movadon kaj en ĝi rekonos tipojn ĉie troveblajn, ĝi tute ne estos malpli interesa ol romano.

Vere tiu ĉi libro estas utila al ĉiuj. La entuziasmulo eble pleje ŝatos la kortuŝajn paĝojn, la propagandisto eltiros utilajn konkludojn el la partoj preparolantaj organizon, propagandon ktp. Krome estas partoj ekzemple la ĉapitro pri *Bogdanov* kaj ankaŭ aliaj, kiuj impresas kvazaŭ interesaj noveloj.

La homoj ne estas tro malsamaj, kelkaj variaĵoj ripetiĝas ĉiam kaj ĉie. Dank' al ĉi tiu vero, la aŭtoro, verkante libron pri sia vivo kaj pri la bulgara Esperanta movado, verkis ion iel similan al spegulo, en kiu multaj esperantistoj kaj preskaŭ ĉiuj naciaj movadoj povas rekoni sin mem.

Kaj ĉion ĉi la leganto ricevas en vere bona, flua, facila stilo, en kiu difektetojn povas trovi nur tre skrupula stilkritikisto. Kaj por ne esti tia, mi estas sufiĉe subaĉetita per la interesa legaĵo.

Vince.

STANISLAW BALINSKY: LA LASTA KRAVATO DE ALEKSY.

El la pola originalo tradukis Stanislaw Karolczik. Biblioteko de Pola Esperantisto. Warszawa. 1925. Prezo 50 gr. 24 pĝ.

Interesa psikologia rakonto kun iom mistike peza atmosfero. Ĝi estas vere leginda.

Sed, sincere, tiaj kajeretoj vere ne estas fierajoj de nia literaturo. Tiaj mallongaj aĵoj devus aperi en literatura revuo, eble en ia, 48-paĝa Literatura Mondo. Nu, sed por tio mankas publiko.

Ni ĝoju do ankaŭ pri tiaj kajeretoj, ili estas malpli karaj, malpli pretendemaj kontraŭ esperantistaj oferemoj.

La stilo de la kajereto ne estas malbona, eĉ, ofte verva kaj bela. Sed kravatono ni ne povas *bindi*, ĝi ne estas *libro*. Krome la uzo de la *artikolo* estas ofte konfuza. Amstataŭ *gentelmano* kaj *spleen* eble pli Esperantaj estus *gentilhome* kaj *spleno*.

Vince.

INTERNATIONAL RADIO MANUAL BY H. A. EPTON.

London. British Esp. Assocn. 1925. 80 pĝ.

Ne estante kompetentaj pri la verko mem, ni nur esprimas nian ĝojon pri ĉi tiu lerta kaj vasta pliriĉigo de la Esperanta vorttrezoro. La manko-kompensa libro certe trovos fidelan aĉtantaron.

Vince.

ARTURO GHEZ: VI SOLA, ESPERANTO, POVAS FARI TIAJN MIRAKLOJN.

Eldonanto A. Paolet. S. Vito Al Tagliamento. Pĝ. 40. Prezo It. L. 1.50.

Oni ne povas nei, ke la stranga historio, kiu nin ridigas en tiu ĉi libeto estas farita kun tiu iom arbitra rajto de temokirilo, kiun la farsverkistoj kutime pretendas al si. Sed tion oni rimarkas nur poste. Dum lego oni ridas, kelkfoje vere bonguste, kaj tio nuntempe estas trezoro.

Sed se la aŭtoro ne estus perforte enŝtopinta Esperanton je la fino, la teatraĵo valorus je 30% pli multe.

Stilon li havas tre viglan.

Vince.

## „I N F O R M O J“ de Esperanto-Asocio de Estonio

estas tre leginda ankaŭ por neestonianoj! Pri tio ĉi konvinkigu — mendu tuj specimenan numeron (aldonante respondkuponon)!

„Informoj“ estas monata gazeto, aperanta jam pli ol tri jarojn. — **Konstantaj fakoj:** Debatejo; lingvaj demandoj; recenzoj; korespondadreso; kroniko kĉet. — **Kunlaboradudeko** da spertaj gesanoj estoniaj kaj alilandaj, bone konataj en la esperantista mondo.

**Kelkaj ĝis nun aperintaj artikoloj:** Ĉu „fino“, „suomo“ aŭ „fino“? — Esp-istaj vojaĝoj al la Nurnberga, la Viena kongreso, — al Stokholmo, Budapeŝto. — Kiel oni paroladu (atentigoj al propagandistoj). — Estona klerministro favoras Esp-on. — Esp-o, scienco kaj eklezio. — Iom pri lingvoj. — Esp-o kaj ŝaki. — Kiel oni esperantistigis (enketo). — Estonaj proverboj ktp. ktp. — Spegulo de esperantismaj pensoj en estonaj mensoj! — **Abono:** 1 jaro — 2.50 Sv. fr. ¼ — 0.75 Sv. fr. **Anoncoj** (ĉiaj) nur 5 Sv. cent. por 1 kv. cm. — **Aministrejo:** Tallinn, Estonio-poŝk. 6.

**Ĵus aperis! „VIKTIMOJ“ Ĵus aperis!**



**Jus aperis  
en libroformato**

La Literatura Mondo volente cedis al deziro de multaj el sia legantaro kaj per la malavara helpo de Hung. Esp. Instituto nun ebligas ne multekoste la aĉetadon de

**romano de Julio Baghy**

Senpartie verkita tendencromano pri milito kontraŭ la milito. Tragikomikaj dramaj epizodoj vicigas antaŭ la leganto sur

**cent sesdek du paĝoj**

kaj donas realan bildon pri vivo de siberiaj militkaptitoj en kadro de interesa historio

**Tuj mendu**

ĉar la triono de la ekzempleroj jam estas venditaj kaj tre verŝajne la tuto

**baldaŭ elĉerpigos**

**Kostas nur 25.000** hungaraj kronojn

Mendebla ĉe:

**HUNGARA ESP. INSTITUTO**

Budapest, VI, Eötvös ucca 3. szám

**KVAR PUNKTOJ**

instigas nepre aboni al

**Heroldo de Esperanto**

Ĝi estas

**Duonsemajna  
Aktuala Ilustrita  
Grandformata**

Senpagajn specimenojn petu de la administracio

**Horrem b. Köln, Germanl.**

Reprezentanto en Hungarujo:

**Hungara Esperanto Instituto**

Budapest VI, Eötvös-ucca 3

**EKKONU**

la novan movadon de Oomoto, kiu celas venigi mondon morale unuigitan per Dia gvido, plenan je amo, kaj decide kompletigi la reformon kaj rekonstruon de la mondo.

**„OOMOTO“**

monata, Esperanta gazeto vin kompleze gvidos al la elklariĝo de tiu grava movado.

Senpagan specimenon postulu de la oficejo

Jara abono: 2.40 Jenoj, 4.80 Sv. Fr.

kaj ĉiu egalvaloro. La abonmono estu sendata nepre per poŝta mandato aŭ internacia respondkupono. Skribu la adreson legeble.

**OOMOTO PROPAGANDO OFICEJO**

**KAMEOKA. KIOTO-FU JAPANUJO**